



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Marto 2018 n-ro: 27



## *Merhaba,*

2018'in üçüncü sayısına vardık bile. neredeyse yılın dördte birini bitirdik.

Bu sayımızda da ilginç yazılar var. Kolay yazılar da var zor yazılar da.

Önemli yazılardan birisi en sondaki Esperanto'ya dair bazı istatistikler. İstatistik sonuçları çok önemli olmasa da içerikteki bilgiler bayağı önemli okumanızı tavsiye ederiz.

Marrt ayı, 11 Mart 2011 'de Japonya'da meydana gelen felaketin yıldönümü. Bu konuda Bulgaristan'dan Elena Popova'nın hajku'lardan yazdığı uzun şiirini okumanızı tavsiye ederiz...

*Hepinize iyi okumalar !*

## *Saluton,*

Ni jam alvenis al la tria numero de Turka Stelo en 2018, kaj ni preskaŭ finis la unan kvaronon de la jaro.


En ĉi tiu numero estas diversaj kaj interesaj artikoloj, kiuj estas kaj facilaj kaj malfacilaj.

Unu el la plej gravaj artikoloj estas tiu en la fino de la revueto kun statistikoj pri Esperanto. Kvankam la proporcioj en la tabuloj ne estas tiel gravaj, ni pensas, ke la enhavo de la tabuloj estas interesaj.

En marto estas la datreveno de la japana katastrofo, kiu okazis en la 11-an de marto en 2011. Pri tiu katastrofo ni proponas, ke vi legu la longan poemon de Elena Popova el Bulgario. La poemon konsistigas multaj hajkoj...

*Bonan legadon al ĉiuj !*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Rakontoj pri Afanti ka aliaj	4
La Ŝejko	5
BEL konferencoj 2018	5
Maratono	6
Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN (parto 3)	9
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 2)	10
Niaj Homoj	11
La Mastrino	12
Forgesemo	14
La libroj de la jaro 2017	15
Du homoj Babiladas	18
Atentu vian animon mia frato	18
Pentristo de la simpla homo kaj de la naturo	19
Kurcvortenigmo	20
Ŝercoj	21
Al memoro de la japana katastrofo	21
El la libro de "Dao de Jing" (19)	22
Dankon Amiko (14)	22
Mallonga Historio de Filozofio (26)	23
Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno	24
Kiel propagandi Esperanton?	25
Ĉu la turka lingvo povas iĝi internacia en Meza Azio?	26
Legindaj Esperanto-Blogoj	26
Iom granda aĉeto	29
Esperanto en Interreto (parto 1)	30
Veganarto	32
Malferma Tago de CO	32

## Kursoj



1) Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 5 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar. La alia kurso, kiun gvidis Nicola Sarmiento

bedaŭrinde perdis siajn lernantojn.

2) La pagata kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto ĉe ÖBD Sciencfikcia Biblioteko kies gvidanto estis Murat Özdizdar estas haltigita kaj ŝajnas ke ĝi ne plu refunkcios.

3) La Esperanto kurso ĉe Çirak Atölye en Cağaloğlu distrikto en la Eŭropa parto de Istanbul, kiun gvidas Vasil Kadifeli daŭras kun 8 lernantoj. (vidu la foton sube)



4) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

5) En februaro okazis kvar-leciona rapida kurso de Esperanto por la lernantoj de Avcılar Kozmos Yazılım Lisesi lernejo kadre de la projekto "**Unu lerneja horo pri Esperanto**".



## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La **50-a Internacia Esperanto-Sumoo** okazis inter la datoj 14 kaj 28 en januaro 2018.

La nombro de la partoprenantoj estis 310 el 34 landoj. La perfektaj venkintoj estis 276 (89%). Entute pli ol 15 000 paĝoj estis legitaj. Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj en la Sumoo. (El **Turkujo** partoprenis du luktistoj, nome Fatma Eroĝlan kaj Vasil Kadifeli, kaj ili ambaŭ venkis.)

Partoprenantoj en ĉiuj landoj krom en Koreio pli kaj pli multiĝas. Kaj la nombro de landoj estis 34, la plej granda en nia historio. La sumoo pli kaj pli disvastiĝas en la tuta mondo.

Malkresko en Koreio estas tre bedaŭrinda afero. Oni ne organizis sian propran sumoo-ĉambron, kaj eble ne rekomendis, ke eksaj koreaj partoprenintoj translokiĝu en la internacian scenejon, tial eĉ veteranaj partoprenintoj ne aliĝis. Ni vere esperas restariĝon de koreaj sumoo-istoj.

Neniu partoprenis el Afriko. En la lasta Sumoo du homoj partoprenis el DR Kongo, sed en januaro neniu. En DR Kongo la eksa prezidento ne forlasas sian postenon, tial okazas politika tumulto. Ni timas, ke pro tio ili ne partoprenis.

Ĉi-foje aperis unu partoprenanto el Aŭstralio. Ni esperas, ke li daŭre partoprenos, varbante siajn konatojn.

Svisaj gelernantoj partoprenis. Ni dankas al Monika, ilia instruistino.

Nove partoprenis unu el Dominika Res., sed male iuj landoj malaperis.

**La marta sumoo okazos inter la 18-a de marto kaj la 1-a de aprilo.**

## UEA



N-ro 724 (2018-01-31)  
**La januara numero de la revuo Esperanto elŝuteblas senpage**

En la retejo [revuoesperanto.org](http://revuoesperanto.org) estas senpage elŝutebla la januara numero de la Revuo Esperanto, la plej renoma periodaĵo en Esperantujo, aperanta jam 111 jarojn. La numero estas la unua en la jarkolekto 2018, la Jaro de Esperanto-Kulturo. [...]

N-ro 723 (2018-01-27)  
**Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro 27 januaro 2018.** Ĉiujare la 27-an de januaro Unuiĝintaj Nacioj rekonas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, la tagon de la liberigo de la ekstermejo Auschwitz-Birkenau kiun starigis la Nazioj kiel parton de sia programo de genocido. [...]

N-ro 722 (2018-01-23)  
**Aŭtoraj duonhoraj kaj Libroj de la Jaro dum la 103-a UK** PROPONOJ ATENDATAJ!  
Dum la 103-a Universala Kongreso en Lisbono okazos tradiciaj kulturaj programeroj "Aŭtoraj Duonhoraj" kaj "Libroj de la Jaro". [...]

N-ro 721 (2018-01-19)  
**Alvoko al partopreno en la Esperantologia Konferenco, Lisbono 2018**  
La organizantoj de la Esperantologia Konferenco 2018 okazonta en Lisbono, Portugalio, kadre de la 103a Universala Kongreso de Esperanto alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2018, [...]

## TEJO



**AEJK Projekto – Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligho**

(VIDEO)

AEJK – Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligho estas projekto, kiu koncentriĝis pri kapablokonstruado de junuloj pere de neformala edukado kaj pri trejnado de trejnistoj. Ĝi permesis proksimigi membrojn el foraj landoj kaj pliriciĝi nian komunumon. [...]

**Aliĝu al trejnado pri atentema kunestado ĉe IJF en Italio**

Dum la Internacia Junulara Festivalo en suda Italio, kadre de la Erasmus+ projekto Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ), okazos trejnado pri atentema kunestado, alirebleco kaj egala komunikado. [...]

**Malferma alvoko por iĝi estrarano de TEJO**

La 31an de decembro 2017, la Prezidanto de TEJO, Enric Baltasar, anoncis sian demision kiu efektiviĝis ekde la 2a de januaro 2018. Krome tiam estis anoncita (sed ne ankoraŭ konfirmata aŭ malkonfirmata) baldaŭa demisio de la estrarano Doniben Jiménez Jaramillo. [...]



**IJF – Internacia Junulara Festivalo 2018** okazos en Marina di Ascea (provinco de Salerno, Kampanio, Italio) de la 28-a de marto ĝis la 3-a de aprilo. [...]

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Dankon! La revuo havas nekutime buntan enhavon. Mi popularigas ĝin inter miaj esperantistaj gekorespondantoj. Ginette Martin ekverkis al Turka Stelo laŭ mia iniciato, kaj kiel bone! Gratulon al la redaktisto kaj al la kunlaborantoj!

**Lenke Szász el Rumanio**



Elkoran dankon por la alsendo de la belega riĉenhava Turka Stelo! Gratulon al ĉiuj! Dankon por aperigi miajn poemojn!

**Maria Nazare Laroca el Brazilo**



Karaj sumoo-istoj, aperis Turka Stelo kompilita de unu el la prizorgantoj. La revuo estas nekredeble bela kaj enhavoriĉa, do ĝi certe

plaĉos al vi, libroamantoj. Kelkaj sumoistoj elektis ĝin kiel libron por la januara sumoo. Ankaŭ vi povos.

**HORI Jasuo, el Japanio**



Nekredeble riĉenhava estas la februara Turka Stelo. Fakte ĝi devus nomiĝi Turka Stelaro! Kiel povas unu sola homo produkti tian juvelon? Dankegon pro ĉi tiu valora donaco!

**Paŭlo Sergio Viana, el Brazilo**



Dankon pro la sendo de la "Turka Stelo". Ĝi estas tre bone kaj bele eldonita, interesa, varia kaj riĉenhava. Gratulon!

**Carlos Spinola, el Hispanujo**

## Rakontoj pri Afanti kaj aliaj

### Turbano

Afanti promenis sur strato portante sur la kapo turbanon grandan kiel korbo. Lin renkontis iu, kiu petis: "Sinjoro instruito, bonvolu helpi al mi legi ĉi tiun leteron."

Afanti respondis: "Mi ne konas eĉ unu literon kaj tial mi ne povas legi la leteron."

La petinto ege miris kaj plu demandis: "Sed vi havas tiel grandan turbanon! Ĉu vi vere ne povas legi leteron?"

Afanti malvolvis la turbanon de sia kapo, volvis ĝin ĉirkaŭ la kapo de la homo kaj respondis: "Bone! Bone! Se vi kredas, ke sub granda turbano kuŝas ĉioscio, vi mem provu, ĉu vi nun povas legi leteron."

el Rakontoj pri Afanti, Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino 1982.

### Bona solvo

Ŝahpur Sosani estis reĝo de Persio kaj vivis en la 4-a jarcento. Kiam li estis ankoraŭ knabo, li aŭdis tage bruon ekster la kortego. Li demandis siajn korteganojn, kio okazas. Ili respondis: "Urbanoj pasas

## sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

la ponton, kiu estas apud kortego. Ĉar la ponto estas tro mallarĝa, pasantoj inter si insultas, disputas kaj krias."

La juna reĝo tion pripensis kaj diris: "Kian konsilon vi povas doni al mi por forigi la malhelpon?"

Unu el la korteganoj respondis: "Starigu ĉe la ponto soldatojn kaj ili reguligu la transiradon."

La konsilo ne plaĉis al la juna reĝo: "Iu el la pasantoj povus havi urĝan aferon kaj la deĵoranta soldato povus malhelpi lin, ke li ne atingus sian celon."

"Do, kio estas farota laŭ la opinio de Via Reĝa Moŝto?" demandis altranguloj kun respekta voĉo.

"Oni tuj ekkonstruu duan ponton: unu ponto servos al la pasantoj irantaj tien, la alia ponto por irantoj reen." Tiel ordonis reĝo Ŝahpur Sosani kaj la kontenta urbanaro laŭdis lian saĝon.

El persa lingvo Bahman Ŝidani, Teheran, Irano..

fonto: [http://esperanto.wz.cz/Legolibreto\\_I.pdf](http://esperanto.wz.cz/Legolibreto_I.pdf)



Esperanta Gramatiko? (Francisco Wechsler)

09:40 Diskuto

10:00 La Monstro Datrevenas: 200-jara Frankenstein (Paŭlo S Viana)

10:40 Diskuto

11:00 Poeziumado: Vojo al Plej Alta Lingvonivelo (Paulo Nascentes)

11:40 Diskuto

12:00 Tagmanĝo

14:00 Amikumu: Mojosa kaj Utila Ilo (Karina Oliveira)

14:40 Diskuto

15:00 Esperanto Jam Venkis! (José Passini)

15:40 Diskuto

16:00 Fidplena Esperantisto, Ĉu Vi? (Elmir S. Lima)

16:40 Diskuto

17:00 Fermo

Oni atentu pri la ĝusta adreso de la evento:

Museu Ferroviário

Av. Brasil, 2001, Centro, Juiz de Fora - MG

< < <

## LA ŜEJKO

**D**e longa tempo li revis viziti Abudabion. Tiuj blankaj pejzaĝoj, aŭdacaj konstruaĵoj, lukso, la naturo kopiita de la homo, la heleco, la koloroj, la aero de dezerto. Kaj super ĉio, la majesta simbola domego en formo de grandega velbarko. Burj Al Araba, la plej luksa hotelo en la mondo, inter du senfinaj, misteraj dezertoj – unu el akvo, alia el sablo. Iam li gastos tie, tute apude.



Li vidis sin cirkulanta en luksa hotelo, sinjoro de neimageblaj dorlotoj. Viroj sub

turbanoj, virinoj sub vualoj. Alia alfabeto, alia religio, aliaj moroj. Li havis ian emon al ekzotaĵoj.

Nu, alvenis la tago ekkoni Abudabion. La malkvieteco estis ekstrema, ĝis li elaviadiliĝis kun la impresoj, ke li iam vivis tie, en fora pasinta tempo. Komenciĝis ravaj tagoj. La taksio, Mercedes Benz, kondukis lin al plenstela hotelo, kie la akceptado multobligis ĝentilaĵojn. Tuj proksime, staris Burj Al

## BEL Konferencoj 2018

### BEL-Konferencoj 2018



En la 30-a kaj 31-a de Marto  
Museu Ferroviário  
Av. Brasil, 2001 Centro  
Juiz de Fora - MG

La Kultura Esperanto-Asocio de Juiz de Fora invitas ĉiujn al partopreno de la tradiciaj BEL-Konferencoj, kiuj okazos en la 30-a kaj 31-a de Marto. Sekvas la varia programo:

30/03 (vendredo)  
13:00 Malfermo  
14:00 La Humura Poezio de Belmiro Braga (1872-1937) (Nazaré Laroca)  
14:40 Diskutado  
15:00 Francisco Valdomiro Lorenz: Neimagebla Homo

(João Santos)  
15:40 Diskuto  
16:00 Interna Ideo – Animo de Esperanto (Affonso Soares)  
17:40 Diskuto  
18:00 Arta Vespero: Brazila Tradicia Muziko "Chorinho" (Ensemblo "Samba e Choro")

31/03 (sabato)  
09:00 Apozicio kaj Nominacio: Ĉu Monstroj de la

## sendis Dr. Paulo Sérgio Viana, el Brazilo

Arab. Li iradis kaj reiradis sennombrajn fojojn tra tiuj puraj, ornamitaj stratoj, konstante balaataj de la vento el la dezerto. Li preterpasis ŝikajn homojn, bele vestitajn, brunhaŭtajn elegantajn virojn, ĉiam kun mienoj seriozaj kaj memfidaj. De la virinoj, silentemaj, oni eĉ ne aŭdis la paŝojn. Li sin banis en naĝejo el ĉampano, li manĝis diecajn abrikotojn kaj daktilojn, li kuŝis en spegulplena hotelĉambro, li plenigis siajn orelojn per hipnota muziko. Li eĉ surgenuiĝis turninte sin al Mekko, en iuj horoj en la tagoj: li ne povus neglekti la okazon surgenuiĝi direkte al Mekko. La Profeto certe estis kontenta.

Tiuj estis tagoj de ekstazo. Sed ĉio alvenas al fino. Kun la okuloj kaj la koro plenaj de ravo, li devis reveni hejmen. Kiel plilongigi la magion?

Li ne hezitis. Li envenis stilan vendejon kaj mendis aŭtentikan ŝejkan veston: malpeze ŝvebanta silko sablokolora, kun larĝaj manikoj, impona turbano, kiu perfekte alĝustiĝis al lia kapo, ornamita per rubeno super la frunto. Tre multekosta! Li elaviadiliĝos en la flughaveno, en San-Paŭlo, en vesto de ŝejko. Glorie! Liaj filinoj atendas lin en la halo, kaj kiam ili vidos lin, ili eĉ ne rekonos sian patron. Kia surprizo! Pura majesto.

Tiel li faris. La vojaĝo ŝajnis neniam finiĝi. Li eĉ ne sukcesis dormi, antaŭvidante la sukceson de sia alveno. Kiam mankis duonhoron por al alteriĝo, li eniris la necesejon de la aviadilo kaj pretigis sin. El tie eliris kompleta, perfekta ŝejko. Eĉ la mentonbarbo kongruis kun la vesto. Li devis malsupreniri la eliran ŝtuparon el la aviadilo iom levante la jupon, por ke eviti stumblon kaj la turbanon por eviti, ke ĝi forflugu.

Fine, la eliro el la flughaveno. Li ekstaris malantaŭ la aŭtomata pordo, li faris tri solenajn paŝojn kaj ĝi malfermiĝis, kaj montriĝis lia tuta brilo. La halo estis plena. Inter homoj, kiuj atendadis siajn familianojn kaj konatojn, iuj ridetis, vidante lin. Dum unu sekundo li duonvidis iom da mokemo en tiuj ridetoj. "Kompatindaj, ili ne konas Abudabion." Li serĉis siajn filinojn. Vane, ili ne ĉeestis.

Tiumomente eksonis la telefonaparato. Tio estis unu el ili, kaj ŝi informis, ke la trafiko retenis ilin, kaj ke ili alvenos post duonhoron, aŭ iom pli.

Li klopodis konservi la dignon, sin direktis per malrapidaj paŝoj al la necesejo en la flughaveno, por ŝanĝi siajn vestojn.

verkis **Dr. Paulo Sérgio Viana**, el Brazilo



Fonto: <https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com.tr/>

**K**io estas ja pli forta, ĉu la ideoj aŭ la perforto? kio estas supera, ĉu la spirito aŭ la forto? kio estas pli rezultodona, ĉu la libera elekto aŭ la altrudita devo?

Estas demandoj unuavide simplaj, tamen tre malfacilaj, ĉar certaj tiatemaj respondoj devas esti akompanataj de pruvoj. Estas pro tio, ke mi konsilas sin turnon al la Historio, kiu ekzakte tion oferas, pruvojn!

Antaŭ preskaŭ 2500 jaroj, la sola tre granda, preskaŭ tutmonda, potenco estis la persa imperio. Mi diras "tutmonda", ĉar la povo de la Persoj kovris la tutan tiam konatan Azion kaj la solan signifan parton de Afriko, Egiptujon. Ĉiuj iam fortaj nacioj de la tuta tiu senlima mondoparto estis submetigitaj, impostpagantaj subuloj de la plej potenca, nevenkebla monarkotirano, la reĝo de Persujo, kiu tiam estis Dario (Δαρείος). Inter la gentoj submetigitaj al la persa tiranio estis la Ionianoj (Ιωνες), la Helenoj loĝantaj ĉe la okcidentaj marbordoj de Malgrandazio. Kiam la Ionianoj ribelis kontraŭ la tiranoj, petis la helpon de la granda helena urbo-ŝtato Ateno (Αθήνα) kaj ankaŭ de la amika Eretrio (Ερέτρια), signifa urbo sur la helena insulo Eŭbeo (Εύβοια). Ambaŭ helenaj civitoj sendis helpon el ŝipoj kaj batalantoj, tamen, malgraŭ tio, la ribelo post nelonge estis sufokita. La persa reĝo, Dario, uzante tion kiel pretekston, decidis militiri kontraŭ tiuj du helenaj urboj, por ilin puni. La vero estas ke li ne interesiĝis pri tia puno, sed li opiniis ke estis favora la tempo por ke li plenumu sian revon, konkeri Eŭropon (Ευρώπη), la solan kaj lastan parton de la mondo, kiu ne apartenis al li. La persa reĝo bone sciis, ke kontraŭ tiu lia ambicio sola baro estis Helenujo kaj la Helenoj.

Ofte mi demandas min kiom da Eŭropanoj, da Amerikanoj, da tiuj homoj kiuj apartenas al la nuna okcidenta mondo, scias al kio ili ŝuldas sian altnivelan



civilizacion, plejparte bazitan sur la principoj de la demokratio kaj de la spirita libereco. Miloj da paĝoj estis skribitaj de historiistoj de ĉiuj epokoj, tamen, mi kredas, ke nur malmultaj ordinaraj homoj scias, ke ĉia ĝisnuna atingo de la okcidenta civilizacio estas

ŝuldata al la feliĉa finveno de tri tre malnovaj milit-bataloj. Fakte, trifoje, en Helenujo, en 490 a.K. en Maratono, en 480 a.K. en Salamis (Σαλαμίς) kaj en 479 a.K. en Plateo (Πλαταιαί) okazis tre signifaj militkolizioj, en kiuj la decidigaj venkoj de la Helenoj preventis definitive la barbaran konkeron de Helenujo kaj sekve de la cetera Eŭropo.



Tamen, por reveni al mia rakontado, mi diru, ke kiam Dario decidis entrepreni la unuan invadon, kolektis sian multenombran armeon (90000 viroj) kaj ŝiparon (600 triremoj kaj nekonata nombro de transportŝipoj) en Cilicio (Κιλικία). La persa militistaro konsistis ne nur el Persoj, sed ankaŭ el dekoj da armeoj, devige senditaj de la multaj satrapioj, de la submetigitaj nacioj.

La Helenoj, unu popolo kun komuna lingvo, religio, ĉefaj kutimoj, estis admin-istracie dividitaj en multaj, sendependaj, diversgrandaj civitoj-ŝtatoj. Tiuj civitoj havis inter si rilatojn jen amikajn, jen neamikajn, ili havis kontraŭecojn, depostulojn, komunajn aŭ kontraŭajn profitojn, ili havis inter si kunlaboradojn, aliancojn, kontraŭecojn, konfliktojn, ĉion. Kelkfoje, solvon al la pli komplikaj problemoj donis la armiloj, aliffoje arbitraciantoj eĉ orakoloj de komunaj sanktejoj-divenejoj. Tamen ĉiuj civitoj respektis samnivele la prapatran komunan heredaĵon, la helenajn morojn, ili kune partoprenis, en paca, unueca etoso la tradiciajn, tuthelenajn religiajn, atletikajn, belartajn, komercajn k.a. aranĝojn, kaj plejofte, tute fervore unuiĝis por kune kontraŭstari al serioza barbara militatako. La du plej potencaj helenaj ŝtatoj estis Ateno kaj Sparto (Σπάρτη), la unua precipe finance kaj kulture forta, la dua armee nekonparebla, milite nevenkebla. La pli multaj el la ceteraj ŝtatoj estis ordinare sub la protekto de unu el tiuj du potencoj. En la helenaj armeoj ne estis profesiaj militistoj, ĉiu civitano, kiu povis porti kaj uzi la armilojn estis batalanto, ĉiam preta meti sin sub la militordonoj de la respondaj ĉefoj.

Nu, la persa floto, trapasante la Egean Maron atingis, atakis kaj detruis kelkajn helenajn insulojn, fine ĝi atingis kaj detruis Eretrion kies loĝantoj ĝustatempe forlasis la urbon kaj rifuĝis sur la montoj. Post tio la granda floto atingis la lokon plej taŭgan por la elŝipiĝo de la multenombra armeo. Tiu loko estis Maratono, ĉemara vasta kampo, estanta sufiĉe proksime al la urbo, al Ateno, kiu estis facile alirebla tra larĝa vojo. La bataltereno estis plejparte ebena kaj taŭga por la movoj de la kavalerio. Krome, estis tie lago, kiu provizus la armeon per la abunda akvo kiun ĝi



bezonis. La elŝipiĝo kaj la starigo de la grandega kampadejo daŭris longe.

Dume, la Atenanoj kun armeo el 10000 viroj (laŭ kelkaj historiistoj nur 8000) ekiris ĝustatempe de Ateno kaj kampadis en distanco de nur kelkaj kilometroj malproksime de la malamikoj, en loko, kiu donis al ili la eblon malhelpi aliron de la malamikoj al flankaj montaj vojoj, kaj ĉian encirkligan manovron de la malamika kavalerio. En la helena armeo, krom la Atenanoj estis ankaŭ batalantoj senditaj de Plateo, urbo aliancita kun Ateno.

En la helenaj armeoj estis kelkaj viroj kun speciala kapablo kaj ekzerciteco, kiuj povis senhalte kuri dum tuta tago. Pro tio ili estis nomataj “tagkurantoj” (ἡμεροδρόμοι), alivorte ili estis heroldoj, tiuj kiuj transdonis urĝajn anoncojn aŭ mesaĝojn. La plej kapabla tia heroldo, fama en la tuta Helenujo, estis la Atenano Fidipido (Φειδιππίδης), kiu, tiun fojon estis sendita al Sparto, por peti la helpon de la Spartanoj. Fidipido atingis Sparton (distanco de 222 kilometroj) post dutaga senhalta kurado kaj pro tiu nekredbla atingo li restis por ĉiam senmorta en la helena Historio. Malgraŭ tio, la Spartanoj, pro lokaj problemoj, ne povis ekiri tuje kaj pro tio ili atingis Atenon post la fino de la granda batalo.

La Persoj, tute certaj pri sia supereco, ne faris fuortoĵojn aŭ remparojn, ili ne fortikigis sian kampadejon, ili nur difinis la pozicion de ĉiu sia armeoparto, kaj post longa preparado kaj ekzercado ili eskalonis siajn batalantojn en longa rekta linio kaj en densaj vicoj.

La tagon de la kolizio, militestro de la Atenanoj estis la stratego Miltiado (Μιλτιάδης), kiu faris la finan planon. Malgraŭ tio, ke la Atenanoj estis tiom pli malmultaj ol la kontraŭuloj, Miltiado lokis ilin en same longa linio, fronte al la malamikoj. Pro sia malgranda numero ili ne povis esti lokitaj en same densaj vicoj, do, Miltiado lasis en la centro de la eskalono nur kelkajn vicojn de bone armitaj kaj spertaj batalantoj kaj densigis la vicojn en la du ekstremoj.

La Atenanoj ekiris la unuaj kaj marŝis rapide por ne lasi la kontraŭulojn mal-proksimiĝi de la marbordo. La plejmulto de la persaj kaj ceteraj barbaraj mili-tistoj ne estis alkutimiĝintaj al miksbatalo. Ili portis mallongajn diversformajn pikbatalilojn, ponardojn kaj lancojn kaj mallongajn ledajn ŝildojn. Do, en miksbatalo kontraŭ la longaj kaj pezaj glavoj kaj lancoj de la Atenanoj ili ne povis longe kontraŭstari. Ilia granda atuto estis la arkistaro, tamen iliaj sagoj ne povis trapiki la longajn ferajn ŝildojn, la kirasojn kaj kaskojn de la Atenanoj. Tute male, la atenaj arkistoj kaŭzis grandan damaĝon al la persa kavalerio, kiu ne povis ludi signifan rolon en la batalo. Malgraŭ tio ĉi, la centro de la persa eskalono, alfrontante tre malmultajn kontraŭulojn, superis kaj iom-post-iome forpuŝadis ilin. La Atenanoj, en la centro, kiel eble plej malrapide kaj laŭorde retiriĝis, kai tio estis antaŭvidita de Miltiado, kiu estis doninta la decajn ordonojn, laŭ kiuj, kiel longe la centro retiriĝis, la fortaj ekstremoj, batalante ŝtorme, forte puŝis la kontraŭulojn al la direkto de ilia antaŭeniranta centro, kaj tiel, iom-post-iome la Persoj estis ĉirkaŭitaj. Kiam la barbaroj, kiuj ne posedis remparitan kampadejon, komprenis ke la vojo al la direkto de la maro, al la ŝipoj, estis blokita, klopodadis ne plu batali, sed forkuri kaj sub la forta premo, la neelteneblaj atakoj de la Atenanoj, kiuj ne plu retiriĝis sed senindulge batadis ilin de ĉiuj flankoj, klopodadis senorde foriri, savi sian vivon. Estas kompreneble ke sekvis vera masakro, post kiu restis sur la batalkampo 6400 mortintaj barbaroj kaj 192 Helenoj. La ceteraj Persoj sukcesis enŝipiĝi kaj foriri.

Mi devojiĝis al priskribo de la batalo kaj tio ne estis mia unua celo. Mi deziris unue montri kiu estis la unua fojo ke Helenujo kaj sekve Eŭropo evitis la barbaran konkeron. Mi celis ankaŭ eksplicite la fakton ke nur malmultaj homoj povis tute venki tiom multenombrian armeon. Pri tio mi povas tute simple diri, ke sur la unu flanko staris homoj kies tasko estis rabi, konkeri,



detrui, sklavigi, dum sur la alia flanko estis homoj kies devo estis la protektado de la patrujo, de la libereco, de la civilizacio. Por efektiviĝi taskon humilan, neniu pretas perdi sian vivon, male, por plenumi devon noblan, oni volonte oferas sian vivon. Tio estas principo fundamenta por ĉiuj liberpensaj homoj.

Por definitive lasi tiun batalon en Maratono, mi diru ankaŭ, ke kiam iĝis evidente ke la venko estas certa, la strategoj ordonis kurieron, tagkuranton, kuri rapide al la urbo por anonci al la civitanoj la ĝojigan informon. Ne estas certe kiu heroldo ricevis la honorigan ordonon, ĉar la historiistoj ne konsentas je tio, unu parolas pri tiu Fidipido, alia pri iu Eŭkliso (Ευκλής). Ne gravas kiu estis, gravas tio, ke tiu viro, tuj post la longa batalo, portante, pro prava fiereco, sian tutan armilaron, kuris senhalte al Ateno (distanco de 40 kilometroj), anoncis al la kunvenintaj civitanoj la venkon, kaj venkita de la lacegiĝo, tuj poste, falis kaj mortis.



Tiu okazaĵo restas viva en la tutmonda historio, ankaŭ ĉar du noblaj viroj, la Franco Pierre de


Coubertin, patro de la modernaj Olimpiaj Ludoj kaj lia samideano kaj ĉefa kunlaboranto, la Heleno Dimitrios Vikelas, havis la brilan ideon meti inter la ceteraj sportkonkursoj de la unuaj Olimpiaj Ludoj de 1896 la maratonon, kuradon samdistancon kun tiu kiun trakuris la antikva kuriero.

Mi ŝatas multe la atletismon, ĉiajn sportkonkursojn, tamen, mi aparte ĝuas, sidante antaŭ la televidilo, la penigan batalon de la admirindaj junuloj kaj junulinoj el la tuta mondo, kiuj partoprenas tiun kuradon. Mi ne serĉas pri la ĉampionoj, ne interesas min kiu estas la unua, kiu la lasta, mi admiras kaj benas ĉiujn, ĉar, kvankam ili ne scias tion, ilia heroa klopodo estas sankte simbola, Fakte, tiuj admirindaj junaj homoj ne estas atletoj, ili estas la kurieroj, kiuj kuras por disanonci al la mondo, ke la bono venkas la malbonon, ke la lumo ĉiam venkas la obskuron!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo



La milit-fer-kasko de Miltiadis, hodiaŭ. Sur la malsupra parto de la kasko, oni legas lian nomon!  
(Muzeo de Olimpio, Peloponezo, Helenujo)



**Mirejo:** Kara Luiza! Vi skribas: “mi persone ŝategas lingvoscipovon”. Tio similas al kolekto en muzeo, al trezoro en banko. Mi dirus pri mi mem: Mi ŝategas lingvouzon, ĉar mi estas babilema.... Se mi uzas lingvon, tio ne eluzas ĝin, ĝi ne malaperas, kiel pantalono eluziĝas, truiĝas kaj finfine finas sian vivon en rubujo. Per uzado de lingvo la parolanto riĉiĝas akirante novajn sciojn.

“...en la komenco mi spertis iuspecan eŭforion pro la rapideco, laŭ kiu la nova lingvo estis eniĝanta mian menson” vi skribas. Jes ja, oni lernas rapide la bazajn regulojn. Se iu lernanto aŭdas, ke la substantivoj ĉiam finiĝas per -o, tion oni ne devas ripeti al li plurfoje. Mi konstatis, ke la lernanto sentas facilecon, dum la lernota lingvo similas al lia denaska lingvo. Poste, kiam la lernanto devas “salti” al novaj strukturoj, tiam

venas sento de malfacileco.

“Tio okazas pro tio, ke mi sentas pli da memfido en Esperanto ol en la angla. (...) ...oni tute ne devas klopodi imiti la akĉenton de denaskaj parolantoj.” Vi tute pravas, kara Luiza. Vi apartenas al la lingvo-komunumo kaj homoj kiel vi konsistigas la normon. En etna lingvo la normo formiĝas ĉe la denaskuloj. Iu lernanto devas klopodi imiti ilin. Niaj denaskuloj estas eta grupo, iliaj gepatroj ofte ne mem estas denaskuloj. Do ili ne povas produkti la normon. La normo kreiĝas okaze de niaj renkontiĝoj, de niaj kongresoj, en nia gazetararo kaj literaturo. La situacio de Esperanto pri tiu aspekto estas tute alia ol por la etnaj lingvoj.

Strange, ke mi foje sonĝas en la germana aŭ svis-germana, ne nur en la franca, ankaŭ en Esperanto!!

Fonto: **ILEI - IPR Revuo 2017-2**

(daŭrigota)

<<<



**D**EK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO  
**Luiza verkis eseon, rande de kiu Mirejo komentis kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas. La komenco de ĉi tiu rakonto aperis en IPR 2016 2 kaj 4 kun komentoj de Mireille Grosjean kaj reagoj de la aŭtorino en dialoga formo.**



### Tria parto

**Luiza:** ĈU FACILA LINGVO?

Mi apartenas al la relative malgranda kategorio de homoj kiuj, kvankam ne talentaj pri lingvolernado, iel ĝuas lingvolernadon. Verdire,

mi persone ŝategas lingvoscipovon, ne lingvolernadon. Tamen, por akiri ajnan lingvoscipovon kaj por plibonigi ĝin... mi ŝvitas lerni preskaŭ entuziasme. Por mi, tiuj ŝablonaj reklamoj kiuj rekomendas Esperanton kiel la plej facilan lingvon en la mondo... ja estis ege logaj. Ĉu mi seniluziĝis pri tio?

Ne. Sed mia nuna vizio pri lingvofacileco iel ŝanĝiĝis.

Mi rememoras, ke en la komenco mi spertis iuspecan eŭforion pro la rapideco, laŭ kiu la nova lingvo estis eniĝanta mian menson. Fakte, post nur kelkaj semajnoj de lernado, mi akiris pli-malpli la lingvonivelon, kiun kutime havas 3-4 jaraĝa infano en sia denaska lingvo. Ŝajnis al mi, ke tre baldaŭ mi scipovos Esperanton samnivele kiel la denaskan lingvon! Sed post kelkaj monatoj, mia Esperanto ŝajnis al mi atingonta la nivelon de la denaska lingvo post ankoraŭ unu jaro. Post du jaroj de lernado (kiam mi jam finis la perfektigan kurson de Boris KOLKER), mi opiniis, ke mi bezonas ankoraŭ kelkajn jarojn por atingi tian celon. Kaj nun? Ĉu mi uzas Esperanton tiom memfide kiel la denaskan lingvon (la rumanan)?

Ne. Sed mi ne plu postulas tion de mi.

Ĝis oni transpasas la mezan nivelon de lernado, Esperanto ja ŝajnas pli facila ol ajna etna lingvo. Poste, ĝi fariĝas ĝuste tiom postulema kiel ajna nenedaska lingvo je kiu oni transpasis la mezan nivelon. Ĝis kiom ajna lingvo proksimiĝas al la nivelo de nia denaska lingvo... tio dependas de la maniero laŭ kiu ĝi eniĝas nian subkonscion. Ekzemple, la enmigrintoj, kiuj vivas en nova lando ekde sia infaneco aŭ adolesko, ofte kapablas alproprigi la novan etnan lingvon eĉ pli bone ol sian denaskan

lingvon. Tio dependas de multaj sociaj kaj psikologiaj faktoroj. Cetere, la denaskan lingvon oni lernas senkonscie nur ĝis la aĝo de 5 aŭ 6 jaroj. Post tiu aĝo tiu, kiu ne klopodas konscie plibonigi la nivelon de sia scipovo pri la denaska lingvo, tiu neniam posedas ĝin je la plej alta nivelo.

El la etnaj nenedaskaj lingvoj, kiujn mi konas, la angla estas tiu, kiun mi regas plej bone. Mi lernis ĝin ekde la aĝo de 10 jaroj, mi studis ĝian kulturon en la Universitato de Bukareŝto, mi instruis ĝin dum jardekoj, mi tradukis el ĝi kaj en ĝin, mi amikiĝis pere de ĝi, mi verkis beletraĵojn en ĝi. Mi scipovas ĝin preskaŭ samkiel mian denaskan lingvon. Eble se mi transloĝiĝus en angle parolantan landon, mi kapablus atingi en ĝi la nivelon de la denaska lingvo. Sed ĝis nun mi travivis per la angla dum preskaŭ 60 jaroj ĝuste la samajn spertojn, kiujn mi travivis en Esperanto dum 10 jaroj. Al iu, kiu observas min de ekstere, povas ŝajni, ke mi babilas en tiuj du lingvoj samnivele, mi legas kaj skribas en ili samnivele, do mi scipovas ilin samnivele. Sed fakte al mi estas pli facile uzi Esperanton ol la anglan, kiam eblas elekti. Tio okazas pro tio, ke mi sentas pli da memfido en Esperanto ol en la angla. Ekzemple, se iu denaska parolanto de la angla korektas unu el miaj esprimoj en angle verkita teksto, mi ne aŭdacas kontraŭdiri lin aŭ ŝin pri la lingvo mem. (Mi ne parolas nun pri stilo aŭ enhavo. Tajperaroj aŭ alispecaj eraroj pro malatento ne rilatas al tiu ĉi diskuto.) Se du amikoj denaske parolantoj de la angla havas malsimilajn opiniojn pri iu frazo uzita de mi en iu teksto, mi solvas la dilemon forigante tiun frazon aŭ... serĉante trian konsilanton. Kutime mi preferas fidi tiun personon, kiu ŝajnas al mi pli klera aŭ pli talenta pri lingvoj.

En la rumana (mia denaska lingvo), tia situacio ne povas okazi. Kompreneble mi dankas tiujn, kiuj proponas al mi plibonigojn de la rumana teksto. Sed mi mem decidus, ĉu iu vere trovis pli taŭgan esprimon por mia penso aŭ sento.

Kiam temas pri Esperanto, mi reagis al korektoj samkiel en la denaska lingvo: mi kapablas kribri la konsilojn de la provlegantoj multe pli bone ol en ajna nenedaska lingvo.

Indas aldoni interesan psikologian fenomenon: Esperanto estas la sola nenedaska lingvo, en kiu mi kelkfoje sonĝas...

Laste sed tute ne malgrave: malsimile al ajna etna lingvo, por Esperanto oni tute ne devas klopodi imiti la akĉenton de denaskaj parolantoj. Laŭ mi, tio estas granda facilitaĵo, kiu multe helpas onin senti sin "hejme" en la Esperante parolanta komunumo.

**E**lian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartaikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org/?inf=9437>

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957.

Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

**GAROLO (rakonto n° 79 p. 124)**



Du garoloj vivis libere en kaĝo, kien ili enflugis ĉiuvespere pasiginte la tagon en arbaroj.

Ilia mastro, kiu estis vartinta je ili, ilin kaptinte el nesto, estis al ili forte korligita, kaj ankaŭ la birdoj al li, ĉar ili ne povis malhavi lin. Ili ja povus resti meze arbojn, esti liberaj, sed ili revenis hejmen, en sia malferma kaĝo tiel, kiel en propra nesto.

Sed, iun tagon ilia mastro mortis. La garoloj, ne plu vidante lin, serĉadis pri li en ĉiuj ĉambroj de la domo, kaj poste restadis en sia kaĝo, rifuzintaj elflugi el ĝi tiel, kiel ili kutimis fari ĉiumatene; Ili kadukiĝis, kaj tagon oni vidis unu bati per la kranio sur la stangojn tiom impete, ke ĝi mortis en nokto. Ĝia kunulo, ina birdo, baldaŭ imitis ĝin, kaj mortis similmaniere, du tagojn poste.

**GRUO (rakonto n° 81 p. 128)**



Gruoj estas birdoj tre sociemaj, kaj interrilatas ege bone, ne nur kun siaj similuloj, sed ankaŭ kun plej multe el la akvo-birdoj. Mi povis observi ĝin de proksime en Israelo, sur la bordoj de l' lago Huleh, kie tiu specio multas, samtempe kiel aliaj migradbirdojn.

Ties singardo estas mirinda, tiom kiom ties inteligento. Ĝi ekkonsciiĝas tuj pri la kondiĉoj novaj kaj neatenditaj en kiuj ĝi troviĝas, kaj agas konskvence, ĉiam dicidejinta en



maniero trafa. Gardostarantoj ĉiam atentigas sursurde de la trupo, kiam tiu paŝtas sin, aŭ estas ripozanta. Se homo sukcesas surprizi ilin, ili neniam revenas en la saman lokon sen ataŭe esti sendinta skolton, poste aron da skoltoj, kaj kiam la skoltrupo revenas, kaj informas, ke ĉia danĝero forestas, dua grupo estas endinta por certigi ĉu la la raporto de la unua ĝustas : nur post tiuj prienketoj, ke la trupo plena ekmovas.

Gruo formas malfalsaj amiko-ligojn kun anoj de specio prencal al la sia, kaj, estante en mallibereco ne estas birdo, kiu ligitas per tiom fidela amikeco kun la homoj; ĝi ne rigardas ĝin kiel sian mastron, sed kiel sian amikon, kaj provadas al tiu tion pravi ĉiel.

Tiu, kiu kelkajn monatojn ligitis al mi, apartenis al iu amiko, kaj nepre ne konsentadis vidi min pasi preter ĝi ne farante al ĝi kelke da ĝentila afablaĵo, kaj se okazis, ke mi forgesis elmontri al ĝi mian amikecon, ĝi ne kontentiĝis antaŭ esti trudinta min tion fari. Ĉar ĝi estis libera, havanta la flugilojn ne malhelpataj, kaj vagadis ĉiam ĉe borde de l' lago, tuj kiam ĝi ekvididadis mian boaton en la for', ĝi majeste ekflugadis, turniĝadis ĉirkaŭ mi, dum kiam mi remas, kaj akompanis min gis la albordiĝejo. Ĝi ĉiam sukcesis trovi min, jen en kampoj, jen borde de l' Jordano, kaj surteriĝis, situiginte min de alta ĉielo, je kelkaj paŝoj disde mi.

Ĝi havis noblajn formojn, kaj ofte ĝi ekdancetis al mi tiun dancon, kiu similas je menueto plenumita far iom petoleta fraŭlino.

Kiam mi forlasis ĝin, mi devis trompkaŝi kaj foriri

ŝtele, ĉar alie, ĝi sekvis min kiel ombro.

Kiam post du jaroj mi revenis, ĝi rekonis min, kaj eliginte laŭte viglajn kriojn, ĝi impetis al mi kun flugiloj malfermaj.

Neniam mi sentis min pli proksima je flughava


kreitaĵo ol kiam mi kunestis kun tiu grupo, tiom amikema kaj serioza, kaj min komprenanta pli ol mi komprenis ĝin.

sendis **Roland Platteau**, el Francio

## "Niaj Homoj"

el revuo **MiA MASI**

**F**orĝisto (Sergej Kuznecov)



### 1/ Kiam vi decidis lerni Esperanton, kion vi deziris ricevi?

Iam komence de la jaro 2011 mi hazarde vidis ĉe Vikipedio artikoleon, kie Esperanto estis menciita. La unuan fojon mi aŭdis pri la lingvo dum leciono pri la germana en la lernejo antaŭ multaj jaroj. Tiam temis verŝajne pri iu teksteto en la formo "Ĉu vi sciis, ke&" Do nun mi decidis iomete informiĝi pri ĝi en la publika reta enciklopedio. Legante mi subite kaptis min ĉe la penso, ke mi jam ekis lerni la lingvon. Tio estis mia unua leciono pri Esperanto.

### 2/ Kiel vi lernis la lingvon?

Mi daŭrigis la memstaran lernadon, trovinte kelkajn bonajn lernilojn en lab Interreto. Mi estis fascinata pri la logikeco de Esperanto kaj ĝia facileco, kiu tamen havas nenion komunan kun primitiveco. Mia unua lernolibro, kiun mi uzis per Kindle, estis la lernilo "Эсперанто? Это просто!" de Abduraĥman Junusov. Tamen tiam mi ankoraŭ ne sciis, ĉu mi okupiĝos pri Esperanto pli serioze. Mi plu havis la senton, ke temas nur pri interesa lingvistika projekto, kiu ne havas ian praktikan utilon.

La lernolibro de Abduraĥman Junusov akcelas la plivastigon de la vortprovizo. Poste mi aĉetis la legendan (kaj legend-an kaj leg-end-an) lernolibron de Boris Kolker, kiu estas ne evitinda por ruslingvanoj, kaj ekvidis, kion oni povas fari per la lingvaj rimedoj disponeblaj en Esperanto.

Mi ekserĉis kontaktojn kun esperantistoj. Mi trovis informojn pri la klubo "Ek MASI" kaj la Lingvaj Festivaloj, organizataj de Irina Gonĉarova. Tiel mi

unufoje renkontis "vivantajn" esperantistojn, kaj la sekva "APERo" fariĝis mia unua E-aranĝo, kie mi jam povis apliki miajn unuajn sciojn kaj scipovojn kaj konsciis, ke Esperanto estas efektive "vivanta" lingvo.

### 3/ Kiel Esperanto ŝanĝis vian vivon?

Mi ne estas tre aktiva, "flama" esperantisto. Tamen la internacia lingvo estas nun firma parto de mia vivo. Mi membras en MASI, REU kaj UEA kaj partoprenis jam kelkajn esperantajn aranĝojn en Rusio kaj eksterlande, interalie ankaŭ la Universalan Kongreson en Rejkjaviko.

Mi regule partoprenas projektojn kiel Esperanto-sumoon kaj Esperanto-Poŝtkruciĝon (EoPK). Tre valora sperto dank' al tiaj projektoj estas konatiĝo kun homoj el diversaj anguloj de la mondo, reprezentantoj de diversaj kulturoj, kiujn mi neniam renkontus sen Esperanto.

Esperanto sendube plibonigas kaj pliriĉigas mian vivon.



Fonto: **MiA Masi #1/5 januaro 2018**

**p.25 >** favore ol retorikon, stenografion aŭ ĉinan gimnastikon. Indas provi, kaj tia propaganda agado devas esti pli efika ol ĝis nun.

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Cetero/propag.html>

verkis **Valentin Melnikov** el Rusio

**M**i loĝis tiam, -- diris Georges Kervelen, -- en meblita luloĝejo en la strato de la Sanktaj Patroj.

Kiam miaj gepatroj decidis, ke mi studos juron en Parizo, okazis longaj diskutadoj por aranĝi ĉiun aferon. La koston de mia pensio ili unue taksis je dumil kvincent frankoj, sed mia povra patrino ekhavis timon, kiun ŝi prezentis al mia patro: "Se li malbone elspezus sian tutan monon kaj ne prenus sufiĉan nutraĵon, lia sano tre suferus. Tiuj junuloj estas kapablaj je ĉio."

Estis do decidite, ke ili serĉos pensionon por mi, pensionon modestan kaj komfortan, kaj ke mia familio pagos rekte la prezon, ĉiumonate.

Mi neniam estis forlasinta Quimper'on. Mi deziris ĉion, kion oni deziras je mia aĝo kaj mi estis preta ĝoje vivi, ĉiumaniere.

Iuj najbaroj, de kiuj oni petis konsilon, indikis samregionaninon, s-inon Kergaran, kiu akceptis pensionanojn. Mia patro traktis do perletere kun tiu respektinda persono, ĉe kiun mi alvenis, iun vesperon, kune kun kofro.

S-ino Kergaran estis ĉirkaŭ kvardekjara. Ŝi estis dika, tre dika, parolis per voĉo de instruktora kapitano kaj decidis pri ĉiuj demandoj per vorto neta kaj definitiva. Ŝia domo, tre mallarĝa, havanta nur unu aperturon al la strato ĉiuetaĝe, aspektis kiel ŝtuparo de fenestroj, aŭ kiel tranĉaĵo de domo sandviĉe inter du aliaj.

La mastrino loĝis en la unua etaĝo kun sia servistino; oni kuiris kaj havis la manĝojn en la dua; kvar bretonaj pensionuloj loĝis en la tria kaj en la kvara. Mi havis la du ĉambrojn de la kvina.

Nigra ŝtupareto, turniĝanta kiel korktirilo, kondukis al tiuj du mansardoj. La tutan tagon, senhalte, s-ino Kergaran supren- kaj suben-iris tiun spiralon, okupata en tiu tirkesta loĝejo, kvazaŭ ŝipestro sur ferdeko. Ŝi eniris dek fojojn sinsekve en ĉiun loĝejon, kontrolis ĉion kun mirinda parola frakaso, rigardis, ĉu la litoj estis bone pretigitaj, ĉu la vestoj estis bone brositaj, ĉu la servo estis tute en ordo. Unuvorte, ŝi flegis siajn gastojn kiel patrino, pli bone ol patrino.

Mi baldaŭ konatiĝis kun miaj kvar samregionanoj. Du el ili studis medicinon, kaj la du aliaj studis juron, sed ĉiuj spertis la despotan jugon de la mastrino. Ili timis ŝin, kiel marodisto timas kampogardiston.

Koncerne min, mi tuj spertis dezirojn de sendependeco, ĉar mi estas laŭnature ribelulo. Mi unue deklaris, ke mi volas hejmenveni je la horo elektita de mi, ĉar s-ino Kergaran estis difininta la dekan horon, kiel la lastan limon. Pro tiu pretendo, ŝi

fiksas al mi siajn klarajn okulojn dum kelkaj sekundoj, kaj poste deklaris:

"Tio ne estas ebla. Mi ne povas toleri, ke oni vekas Anjon la tutan nokton. Vi havas nenion por fari ekstere post certa horo."

Mi respondis kun firmeco: "Laŭ la leĝo, sinjorino, vi estas devigata malfermi al mi kiam ajn. Se vi rifuzos tion, mi konstatigos ĝin ĉe la urba polico kaj iros dormi en hotelon je via kosto, kiel tio estas mia rajto. Vi estos do devigata malfermi al mi aŭ ellasi min. La pordo aŭ la adiaŭo. Elektu."

Mi spitridis al ŝi, diktante miajn kondiĉojn. Post la unua stuporo ŝi volis diskuti, sed mi restis necedema kaj ŝi rezignis. Ni konsentis, ke mi havos ĉefŝlosilon, sed kun nepra kondiĉo, ke neniuj scios.

Mia energio favore impresis ŝin, kaj ŝi de nun traktis min kun neta komplezo. Ŝi havis por mi komplezojn, prizorgojn, delikataĵojn, kaj eĉ bruskan tenerecon, kiu ne malplaĉis al mi. Iajoje, kiam mi estis gaja, mi surprize kisis ŝin, nur por la forta vangofrapo, kiun ŝi tuj ĵetis al mi. Kiam mi sukcesis mallevi la kapon sufiĉe rapide, ŝia mano pasis super min kun la rapideco de kuglo, kaj mi ridis kvazaŭ frenezulo forkurante, dum ŝi kriis: "Ha! Kanajlo! Tion mi repagos al vi."

Ni fariĝis du geamikoj.

Sed jen mi konatiĝis, sur trotuaro, kun knabino laboranta en vendejo.

Vi scias, kio estas tiuj ametoj de Parizo. Iam, irante al la lernejo, oni renkontas junan personon nudkapan, kiu promenas brakenbrake kun amikino, antaŭ ol reiri al la laboro. Oni interŝanĝas rigardojn, oni sentas en si tiun etan skuon, kiun donas la okulo de iuj virinoj. Tio estas unu el la ĉarmoj de la vivo, tiuj rapidaj simpatioj fizikaj, kiujn naskas renkontiĝo, tiu leĝera kaj delikata logo, kiun oni subite spertas ĉe la ektuŝo de homo naskiĝinta por plaĉi al vi kaj por esti amata de vi. Ŝi estos amata multe aŭ malmulte, ne gravas. Estas en ŝia naturo respondi al la sekreta amdeziro de la via. Jam kiam vi unuafoje ekvidas tiun vizaĝon, tiun buŝon, tiujn harojn, tiun rideton, vi sentas ilian ĉarmon eniri en vin kun dolĉa kaj delica ĝojo, vi sentas specon de feliĉa bonstato penetri en vin, kaj la subitan naskiĝon de tenereco ankoraŭ konfuza, kiu pelas vin al tiu nekonata virino. Estas, kvazaŭ estus en ŝi alvoko, al kiu vi respondas, allogo, kiu stimulas vin; kvazaŭ oni jam delonge konus ŝin, kvazaŭ oni jam estus vidinta



ŝin, kvazaŭ oni sciis, kion ŝi pensas.

La morgaŭan tagon je la sama horo, oni pasas tra la sama strato. Oni revidas ŝin. Kaj oni revenas la postan tagon, kaj ankoraŭ la postan tagon. Oni fine interparolas. Kaj la ameto plu evoluas, regula kiel malsano.

Do, post tri semajnoj, mi atingis kun Emma la periodon antaŭ la falo. La falo mem estus okazinta pli frue, se mi estus sciinta, en kiu loko provoki ĝin. Mia amikino vivis en familio kaj draste rifuzis trapasi la sojlon de meblita hotelo. Mi cerbumis por trovi rimedon, ruzaĵon, okazon. Finfine mi elektis senesperan solvon kaj decidis suprenirigi ŝin al mia loĝejo, iun vesperon, ĉirkaŭ la dek-unua, je preteksto de taso da teo. S-ino Kergaran enlitiĝis ĉiutage je la deka. Mi povus do hejmeniri senbrue dank' al mia ĉefŝlosilo, vekante nenies atenton. Ni sammaniere remalsuprenirus post unu aŭ du horoj.

Emma akceptis mian inviton, post kiam ŝi iom kontraŭvolis.

Mi pasigis malbonan tagon. Mi ne estis trankvila. Mi timis komplikaĵojn, katastrofon, iun teruran skandalon. Venis la vespero. Mi forlasis la domon kaj eniris en trinkejon, kie mi glutis du tasojn da kafo kaj kvin glasetojn por ekhavi kuraĝon. Poste mi iris promeni sur bulvardon Sankta Mikelo. Mi aŭdis sonori la dekan, la dekan kaj duonon. Kaj mi iris, per malrapidaj paŝoj, al la loko de nia rendevuo. Ŝi jam atendis min. Ŝi prenis kareseme mian brakon kaj jen ni ekiris, malrapide, al mia loĝejo. Laŭmezure kiel mi alproksimiĝis al la pordo, kreskis mia angoro. Mi pensis: "Espereble s-ino Kergaran estas enlite."

Mi diris al Emma du aŭ trifoje: "Atentu, ne faru bruon en la ŝtuparo!"

Ŝi ekridis: "Vi do tre timas, ke oni aŭdas vin?"

"Ne, sed mi ne volas veki mian najbaron, kiu estas grave malsana."

Jen la strato de la Sanktaj Patroj. Mi alproksimiĝas al mia loĝejo kun tiu antaŭtimo, kiun oni havas irante al dentisto. Ĉiuj fenestroj estas mallumaj. Oni sendube dormas. Mi spiras. Mi malfermas la pordon kun singardemo de ŝtelisto. Mi enirigas mian kunulinon, kaj poste mi refermas, kaj mi supreniras la ŝtuparon piedpinte evitante spiri kaj ekbruligante kandel-alumetojn, por ke la junulino ne faru iun mispaŝon.

Preterpasante la ĉambron de la mastrino, mi sentas mian koron fortege batantan. Fine, jen ni estas en la dua etaĝo, poste en la tria, poste en la kvina. Mi eniras mian loĝejon. Venko!

Tamen mi kuraĝis paroli nur mallaŭte kaj demetis miajn botetojn por fari neniun bruon. La teon,

preparitan sur alkohola kuirilo, ni trinkis sur la angulo de mia komodo. Poste mi iĝis insista... insista... kaj iom post iom, kvazaŭ ludante, mi demetis unu post la alia la vestaĵojn de mia amikino, kiu cedis rezistante, ruĝa, konfuzita, ĉiam prokrastanta la fatalan kaj ĉarman momenton.

Ŝi surhavis nur, vere, mallongan blankan subjupon, kiam abrupte malfermiĝis mia pordo, kaj aperis s-ino Kergaran, kun kandelo en la mano, vestita ekzakte kiel Emma.

Mi faris salton malproksimen de ŝi kaj mi staris, konsternite rigardanta al ambaŭ virinoj, kiuj fikse interrigardis. Kio estis okazonta?

La mastrino prononcis per aroganta tono, kiun mi ne konis de ŝi: "Mi ne volas knabinojn en mia domo, sinjoro Kervelen."

Mi balbutis: "Sed, sinjorino Kergaran, la fraŭlino estas nur mia amikino. Ŝi venis preni tason da teo."

La dika virino pluparolis: "Oni ne surhavas nuran ĉemizon por preni tason da teo. Vi tuj foririgos tiun personon."

Emma, konsternita, esploris kaŝante sian vizaĝon en sia jupo. Mi perdis la kapon, ne sciante, kion fari, nek kion diri. La mastrino aldiris kun nerezistebla aŭtoritato: "Helpu la fraŭlinon revestiĝi kaj forkonduku ŝin tuj."

Mi, certe, ne povis fari ion alian, kaj mi levis la robon falintan ronde, kvazaŭ krevinta balono, sur la plankon, kaj mi pasigis ĝin super la kapon de la knabino, kaj klopodis agrafi ĝin, alĝustigi ĝin, kun grandega peno. Ŝi helpis min, ĉiam plorante, terurita, hastante, farante ĉiajn erarojn, ne plu povante trovi la ŝnurojn nek la butontruojn; kaj s-ino Kergaran staris kun senesprima vizaĝo, tenante sian kandelon enmane, kaj lumigis nin kun la severa pozo de juĝisto.

Emma rapidigis nun siajn movojn, freneze kovris sin, nodis, alpinglis, laĉis, religis kun furiozo, turmentata per urĝa bezono forkuri; kaj eĉ ne butoninte siajn botetojn, ŝi kuris preter la mastrino kaj pelis sin en la ŝtuparon. Mi sekvis ŝin kun pantofloj, mem duone senvestiĝinta, kaj ripetis: "Fraŭlino, aŭskultu, fraŭlino."

Mi ja konsciis, ke necesis diri ion al ŝi, sed mi nenion trovis. Mi reatingis ŝin precize ĉe la pordo de la strato, kaj mi volis preni ŝian brakon, sed ŝi fortege forpuŝis min, balbutante per voĉo mallaŭta kaj nervoza: "Lasu min... lasu min, ne tuŝu min."

Kaj ŝi forkuris sur la straton refermante la pordon post si.

Mi turnis min. S-ino Kergaran estis restinta supre ĉe la unua etaĝo, kaj mi resupreniris la ŝtupojn lantapaŝe, atendante ĉion, kaj preta je ĉio.

La ĉambro de la mastrino estis malfermita, ŝi enirigis min eldirante kun severa tono:

"Mi devas paroli al vi, sinjoro Kervelen."

Mi preterpasis ŝin kun mallevita kapo. Ŝi demetis sian kandelon sur la kamenon kaj, krucante la brakojn sur sia impona brusto, kiun malbone kovris maldika kamizolo:

"Nu, sinjoro Kervelen, vi do prenas mian domon por publika domo!"

Mi ne estis fiera. Mi murmuris: "Tute ne, sinjorino Kergaran. Vi devas ne koleriĝi, nu, vi ja scias, kio estas junulo."

Ŝi respondis: "Mi scias, ke mi ne volas ĉiesulinojn ĉe mi, ĉu vi aŭdas? Mi scias, ke mi igos vin respekti mian tegmenton, kaj la bonfamom de mia domo, ĉu vi aŭdas? Mi scias..."

Ŝi parolis almenaŭ dum dudek minutoj, akumulante la kialojn sur la indignojn, superŝutante min sub la honorindeco de sia domo, pikvundante min per akraj riproĉoj.

Mi (homo estas stranga animalo), anstataŭ aŭskulti ŝin, rigardis ŝin. Mi ne plu aŭdis eĉ unu vorton, vere neniun vorton. Ŝi havis belegan bruston, tiu ino, firman, blankan kaj grasan, eble iom dikan, sed allogantan, kapablan kaŭzi tremojn en la dorso. Mi vere neniam estis suspektinta, ke estas tiaj aĵoj sub la lana robo de la mastrino. Ŝi aspektis dek jarojn pli juna, en la negliĝo. Kaj jen mi sentis min tute strange, tute... Kiel mi povus diri? tute konfuzita. Mi subite retrovis antaŭ ŝi mian situacion... interrompitan unu kvaronhoron pli frue en mia ĉambro.

Kaj, malantaŭ ŝi, en la alkovo, mi rigardis ŝian liton.

Ĝi estis duone malfermita, premita, montranta, pro la kavo en la littukoj, la pezon de la korpo, kiu kuŝis en ĝi. Kaj mi pensis, ke certe estas tre plaĉe kaj tre varme ene, pli varme ol en alia lito. Kial pli varme? Mi ne scias, eble pro la amplekso de la karnoj, kiuj kuŝis en ĝi.

Kio estas pli alloga kaj pli ĉarma, ol malfermita lito? Tiu ĉi ebrigiis min, de malproksime, kurigis tremetojn sur mia haŭto.

Ŝi ankoraŭ parolis, sed nun dolĉe, ŝi parolis kiel amikino kruda kaj bonkora, jam preta pardoni.

Mi balbutis: "Nu...nu... sinjorino Kergaran... nu..." Kaj ĉar ŝi nun silentis por atendi mian respondon, mi ekkaptis ŝin en miaj du brakoj kaj mi komencis kisi ŝin, ja kisi ŝin, kiel malsatanto, kiel homo, kiu atendas tion delonge. Ŝi baraktis, turnis la kapon, ne tro forte kolerante, aŭtomate ripetante, laŭ sia kutimo: "Ho! Kanajlo... kanajlo... ka..."

Ŝi ne povis fini la vorton, mi ekprenis ŝin per fortostreĉo kaj forportis ŝin, prematan kontraŭ mi. Oni ja estas fortika en iuj okazoj! Mi atingis la litrandon, kaj mi falis sur ĝin ne maltenante ŝin... Estis efektive tre plaĉe kaj tre varme en ŝia lito.

Unu horon poste, ĉar la kandelo estingiĝis, la mastrino ellitiĝis por ekbruligi la alian. Kaj dum ŝi revenis enŝoviĝi al mia flanko, enigante sub la littukojn sian rondan kaj fortan gambon, ŝi eldiris per voĉo karesa, kontenta, eble dankema: "Ho!... kanajlo... kanajlo!..."

Tradukis el la franca **Daniel Luez**

Fonto: **La Ondo de Esperanto 1991/1 (#51)**

## Forgesemo

**D**u maljunaj geedzoj iras al kuracisto kaj ŝi plendas pri forgesemo de sia edzo. La kuracisto zorge esploras lin kaj fine diras:

— Nenion misan mi sukcesis trovi en li! Temas pri normala memor-perdo, kiu okazas al grand-aĝuloj. La sola solvo estas skribi la aferojn farotajn, por ne forgesi ilin.

La geedzoj revenas hejmen, sidiĝas kaj ekfunkciigas la televidilon. La edzino diras al la edzo:

— Kara, bon-volu iri al la kuirejo kaj alporti por mi du pecojn da glaciaĵo... sed unue skribu tion sur papero por ne forgesi.

La edzo respondas kolere:

— Kial mi bezonus skribi tiel simplan aferon? Mi bone memoras: du pecojn da glaciaĵo.

Kaj li sin direktas al la kuirejo. Dume, la edzino vokas lin:

— Jes... kaj kovru la glaciaĵon per ĉokolado. Sed skribu ĉion, ĉar male vi forgesos.

— Kial mi forgesus? Jen: du pecojn da glaciaĵo kovritajn per ĉokolado.

Kiam la viro jam eniris la kuirejon, la edzino revokas lin:

— Karulo, aldonu ankaŭ kelkajn pecojn da fruktoj. Ĉu vi skribis ĉion?

— Mi ne estas stulta! Ĉion mi memoras: la glaciaĵon, la ĉokoladon kaj la fruktojn.

La virino plu rigardas la televidilon. Dek minutoj pasas... dek kvin... dudek... Post duonhoron revenas la edzo, portante teleron kun du ovoĵoj, kiujn li prezentas al sia edzino. Ŝi tre koleriĝas:

— Ĉu mi ne petis vin skribi la aferojn, ĉar male vi forgesus? Nu, kie estas la pano?

de **Francisco Wechsler** – Brazilo.

Fonto: <http://facila.org/?p=1600>

**E**n sia trarigardo de la Esperanta libromerkato Paweł Fischer-Kotowski prezentas la plej atentindajn verkojn eldonitajn dum la pasinta jaro. Inter la atentindaĵoj laŭ li estas ankaŭ la papera libro de Pasporta Servo, kiu reaperis post sesjara paŭzo.



La jaro 2017 estis avara je novaj Esperanto-libroj. En la lastaj 12 monatoj sur la bretoj de la Libroservo de


UEA aperis nur iom pli ol 150 novaj varoj, plejparte libroj. Ne temas nur pri libroj esperantlingvaj. Tiuj, kiuj ne estas en Esperanto, estas tradukoj el Esperanto aŭ ili temas pri la lingvo kaj movado.

Ĉiuj novaj libroj estas menciataj en la rubriko “Laste aperis” de la revuo Esperanto kaj en la samtitola reta novaĵletero. Ĉi-jare la rubriko aperis en 7 numeroj, dum pasintjare la listo publikiĝis 10 fojojn. Eĉ se la kvanto de novaĵoj estas malpli granda, ne nepre estas facile orientiĝi en la merkato. Kiuj interesaj titoloj surmerkatiĝis en 2017? Same kiel pri 2016, mi pretigis subjektivan trarigardon.

### Prozo originala

Dum la ĵus finiĝinta jaro surmerkatiĝis tri novaj originalaj romanoj, ĉiuj el plumoj jam konataj al la publiko. La unua el ili estas **Amo inter ruinoj** de Trevor Steele, kiu fakte eliris el la presejo ankoraŭ fine de la antaŭa jaro kaj tial portas la jaron 2016 titolpaĝe. Kvankam la intrigo disvolviĝas en la Esperanto-medio de la komencaj 1990-aj jaroj, la titolaj “ruinoj” ne priskribas nian movadon, kiu tiutempe estis pli vigla, sed aludas la disfalantan tiam Sovetunion. La ĉefrolulo estas la aŭstraliano Travis, kio povas pensigi kiagrade la rakonton diktis la realo. La libro estas verkita en Steele-a stilo, spicita per manpleno da kuraĝaj scenoj.

Ĉe la sama eldonejo aperis fine de 2017 ankaŭ **Murdo en la teatro**, la sepa krimromano de Ronald Cecil Gates. Li estas sendube nun la plej fekunda aŭtoro de tiu genro en Esperanto. Ĉi-foje la trovita



mortinto estas aktoro, kiu baldaŭ devus surscenejiĝi en la universitata teatro. Ankaŭ ĉi tiun fojon la murdiston serĉas la komisaro Roberto Elis, sed verŝajne li bezonis por tio pli da tempo, ĉar la libro, kun 150 paĝoj, estas pli longa ol la antaŭaj verkoj de Gates.

Tute alia estas la tria romano, **El ombro de l' tempo** de Sten Johansson, kun psikologiaj ambicioj. En la romano la nuntempo interplektiĝas kun la 1970-aj jaroj. Tiel la bildoj el la juneco de la protagonisto helpas nin kompreni liajn hodiaŭajn sentojn kaj decidojn. Interese kiom aŭtobiografia estas tiu libro, en kiu la ĉefrolulo estas verkisto...

Ne romano, sed ene de la limoj de la rubriko “prozo originala”, estas la libro de Kalle Kniivilä **La strato de Tanja**. Ĉi tiu nefikcia rakonto, verkita surbaze de dokumentoj kaj rememoroj, pentras historion de unu el la sankt-peterburgaj stratoj en la lasta jarcento. La aŭtoro uzas la 1,5 kilometrojn longan vojon kiel pretekston por rakonti pri la vojo de Sovetio kaj la post-soveta Rusio. Same kiel la tri antaŭaj libroj de Kniivilä, ankaŭ ĝi aperis preskaŭ samtempe en finna, sveda kaj Esperanta eldonoj.

### Prozo tradukita

Malofte ni spertas ke iu romano freŝe aperinta nacilingve kaj aprezata de vasta landa publiko, tuj ricevas Esperanto-tradukon. Tiel okazis pri **La nigra patrino Tero** de Kristian Novak, kiun elkroatigis Josip Pleadin. Alia atentinda traduko estas la galega **Memoraĵoj de kampara knabo** de Xosé Neira Vilas, kiun esperantigis Suso Moinhos. Ĉi tiu dua eniris la prestiĝan Serion Oriento-Okcidento kun n-ro 53.

Notindas ankaŭ **Kara mia homo** kaj **Mi respondas pri ĉio**, la du lastaj volumoj el la trilogio La afero al kiu vi servas de la fama soveta verkisto Jurij German, en la Esperanto-versio de Jurij Finkel.

### Poezio

**Legu po-ete** estas krono de la traduka laboro de Gerrit Berveling. Sur pli ol 400 paĝoj ĝi kolektas liajn disajn poemojn tradukitajn tra la lastaj jardekoj. Jam la titolo sugestas, ke engluto unufoja de la tuto ne eblas.

Por tiuj, kiuj konas **Dialogo** de Júlia Sigmond, longa enkonduko pri la nova **Doloro** ne necesas. Originala – tre bela! – Esperanta poemo de Sigmond aperas en kelkdeko da tradukoj (ĉi-foje 54). La tuto en bela formo, kiu igas la eldonaĵon taŭga ideo por donaco. Mi mem ne povas ĝui la tuton, sed laŭ la

interparoloj kaj komparoj mi konkludas ke iuj el la tradukoj estas etaj majstroverkoj.

## Esperanto-movado

La plej grava primovada libro en 2017 estas sendube **Kie miozotas memor'** de Ed Borsboom, kiu eble unuavide ne ŝajnas tia pro sia malgranda formato. Kolekto de trideko da esperantistaj portretoj en mallonga, anekdoteca formo estas io, kio povas ekinteresi eĉ tiujn, kiuj "ĉi tien venis por ebriiĝi ...". Kvankam seriozaj esperantologiaj studoj, ankaŭ biografioj, estas bezonataj – kaj Borsboom mem estas sukcesa sur tiu kampo kun siaj "Vivo"-j de Lanti kaj Cseh – tiu ĉi formo povas atingi pli vastan publikon. Tio ne nur kontribuas al konstruo de komuna fundamento por la esperantistaro (kaj ne nur novuloj!), sed ankaŭ povas sproni al pliaj esploroj kaj legaĵoj pri unuopaj personoj kaj fenomenoj. Nepre rekomendinda!

Lige kun la 100-a mortodatreveno de L. L. Zamenhof UEA eldonis **Zamenhof en Varsovio** de Roman Dobrzyński, Esperanto-version de la pollingva originalo eldonita samjare. La libro pretendas esti samtempe iom gvidlibro pri Varsovio, iom historia verko pri la urbo, iom pri Zamenhof mem. La aŭtoro nenecese serĉas polecon de D-ro Esperanto.

Alia libro kiun mi klasis primovada, kvankam ĝia teamo estas iom pli vasta, estas biografio pri "eksterordinara homo" (eĉ laŭ la subtitolo) **Francisko Valdomiro Lorenz**, verkita en la ĉeĥa de Vlastimil Novobilský (Esperanto-traduko de Margit Turková). **Omaĝe al Tibor Sekelj** estas kolekto de kvar prelegoj prezentitaj en la samtitola seminarieto en Bjelovar en oktobro 2016.

## Reeldonoj

La eldonejoj Libro-Mondo kaj Fonto daŭrigas laŭdindan reeldonan agadon. Ĉe la unua reaparis interalie la versdramo de Geraldo Mattos, **Ivan la Sesa**. La originala tragedio aperis unuafoje en 1953 kaj estis tre avangarda por sia tempo.

Aliaj reeldonoj de originalaĵoj estas **Karlo** de Edmond Privat – per ĉi tiu 16-a el la oficialaj



eldonoj la rakonto certigas al si la unuan lokon inter la plej ofte reeldonitaj Esperantaj beletraĵoj. Ĝi ja estas konata al preskaŭ ĉiuj esperantistoj, verkita en facila lingvaĵo kaj legata kutime tre frue post la unua kurso. Nun por la unua fojo en iom arta eldono, kun malmola kovrilo.

Sur la merkaton revenis ankaŭ **Printempo en la aŭtuno** de Julio Baghy, kiu laŭ la intencoj de la eldoninto malfermas novan eldonserion, en kiu aperos la tuta verkaro de Paĉjo – fakte tiu, kiu legis la vastajn tavolojn de esperantistoj en la 1930-aj jaroj kaj ĝis nun restas aŭtoro ŝatata kaj konata en nia komunumo, eĉ por tiuj, kiuj ne aparte interesiĝas pri literaturo.

La fama traduko de la pola **Faraono** de Bolesław Prus en la plenumo de Kazimierz Bein fermas la liston de la reeldonoj de Fonto de la verkoj de Kabe. Ankaŭ nun la rakonto pri malnova Egiptio aperas en tri volumoj, kvankam aspekte pli modestaj ol la antaŭaj du eldonoj, kun kovrilpaĝoj laŭ la stilo de la fruaj 1990-aj jaroj. Tamen, ĝi ja estas interesa por iu, kiu ne volas aŭ ne povas legi ĝiajn polvokovritajn antaŭulojn (la lasta el 1957).



La eldonejo Riveroj rehavigis al ni la novelaron **Pri arto kaj morto** de nia plej fama japana literaturisto, Miyamoto Masao.

Temas pri represo de la kolekto de nefikciaj originalaj rakontoj el 1967. Atentinda ne nur pro la "ekzotikeco" de la aŭtoro, la ĉefa reprezentanto de la Oriento en la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ pro ĝiaj artaj valoroj. Alia orientaĵo estas kolekto de noveloj, kiun Korea Esperanto-Asocio aperigis lige kun la 102-a UK en Seulo. Nome, la koreaj samideanoj pretigis duan eldonon de la interesa **Korea antologio de noveloj**.

Pro kronikista devo mi menciu ankaŭ la reeldonojn de la astronomia manlibro **La kosmo kaj ni** de la duopo David Galadí-Enríquez – Amri Wandel, kaj de la brila eseo de Claude Piron **Psiĥaj reagoj al Esperanto**, kiu verŝajne nur pro la fantazio de la eldoninto ricevis novan ortografion (origine: Psikologiaj reagoj...). Estas io perversia en "bonlingvigo" de la titolo donita de iu, kiu aŭtoris La bona lingvo... La 55-paĝa pironaĵo enhavas ankaŭ la eseon Afazio kaj du aliajn lingvorilatajn tekstojn.


## Faka literaturo kaj (inter)lingvistiko

De fakaj verkoj ne venis abundo. Krom la tradicia **IKU-libro**, ĉi-jare eldonita sur luksa, peza papero, kun





malmola kovrilo (tute netaŭge por tia libro, kun same netaŭga prezo), venis ankaŭ **Elektitaj tekstoj pri internacia juro** de Ivo Lapenna. Temas pri kvardeko da tekstoj publikigitaj en la jaroj 1949–1992 tra la gazetaro, nun kolektitaj kaj eldonitaj unuvolume kaj tiel pli facile konsulteblaj.



El la kampo (inter)lingv(istik)a menciindas nur la eldonaĵoj de André Cherpillod. Precipe la kolekto **Promenante tra la lingvoj...**, en kiu la aŭtoro malkovras plej diversajn strangaĵojn kaj mirindaĵojn de niaj lingvoj, sed ankaŭ la broŝuro **Universalglot** pri la unua planlingvo de natureca tipo el 1868 kaj lia traduko de la 35-paĝa lernolibreto **Okcidentalo en kvin lecionoj**.


### Vortaroj kaj terminaroj

La nove aperintaj vortaroj estas la **Serba-Esperanta** (27 mil kapvortoj), **Esperanta-vjetnama** (10 mil kapvortoj, abundaj ekzemploj) kaj **Esperanta-ĉeĥa** (16 mil kapvortoj). Krome, aperis **Rekomendata terminaro Esperanto-angla kaj angla-Esperanto por tradukantoj de oficialaj dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj**, kompilita de Humphrey Tonkin kaj Victor Sadler. La nomoj de la aŭtoroj sufiĉu kiel recenzo pri ĝia kvalito – nepre havenda por ĉiu, kiu en nia movado serioze okupiĝas internacivele pri eksteraj rilatoj.

### Alilingvaj libroj

El la novaj libroj en la roterdama libroservo, kiuj ne estas en Esperanto, la plej grava estas la anglalingva eldono de La danĝera lingvo (**Dangerous Language**) de Ulrich Lins en la traduko de Humphrey Tonkin. Iom kosta (ĉi-jare ĝi okupas la unuan lokon en la listo de la plej multekostaj: € 192,30!), bele eldonita ĉe neesperantista eldonejo, en du volumoj. Tiu libro ebligas iom komprenigi la Esperanto-movadon al neesperantistaj sciencistoj. Mi supozas, ke malmultaj emos aĉeti ĝin kaj meti poste sur la propran librobretaron, sed se vi havas la komforton libere elspezi tiujn ducent eŭrojn, eble konsideru fari donacon por iu proksima al vi universitata aŭ alia scienca biblioteko?

Alia bombo estas la germana traduko de Tur-strato 4 (**Turmstrasse 4**), verkita de Hans




Weinhengst kaj tradukita de Christian Cimpa. Ne ofte aperas nacilingvaj tradukoj de niaj originalaj romanoj, kaj tiun germanigon de verko el 1934 oni tute ne atendus. Tamen, la tradukinto sukcesis konvinki la eldonejon aperigi la tradukon kaj la rezulto estas admirinda. Mi mem ne konas la germanan, sed de aliaj mi aŭdis nur laŭdojn pri la lingvaĵo. La aspekto estas modela. Ho, se niaj Esperanto-libroj povus aperi tiel bele eldonitaj!

**La specie bambina** estas itala traduko de la ĉefverko de William Auld el la plumo de Nicolino Rossi. Kiom malfacile tradukebla estas La infana raso scias ĉiu, kiu almenaŭ trafolumis la libron. Pri la rezulto mi ne kompetentas juĝi, sed mi instigas niajn italajn samideanojn ĝui la verkon. Aldonan legoplezuron devus certigi la spegulpaĝa preso de la originala teksto en Esperanto.

### Aliaj

Atenton meritas ankaŭ la 100-a numero de **Informilo por Interlingvistoj**. La jubilea eldono de tiu bulteno konsistas sole el la indekso de la ĝisnuna enhavo, kompilita de Ino Kolbe kaj Till-Dietrich Dahlenburg. Eĉ se oni ne havas la tutan kolekton ekde 1992, kun la indekso oni povas almenaŭ orientiĝi ĉu indas serĉi la bezonatajn informojn kaj en kiuj numeroj. Cetere, estas ĝojige ke post la morto de la fondinto kaj unua redaktoro, Detlev Blanke, troviĝis personoj, kiuj daŭrigas la eldonadon de tiu kvaronjara publikaĵo.

Inter la menciindaj libroj el 2017 estas ankoraŭ la nova eldono **Pasporta Servo**, kiu revenis en la presita formo post 6-jara paŭzo. Eĉ se ĝi enhavas diversajn misteraĵojn el la tipo de Jarlibro 2017, pro la nunaj cirkonstancoj ĝi estas laŭdinda jam pro la fakto mem ke ĝi entute aperis.



La fama lernolibro de Stano Marček, **Esperanto per rekta metodo**, ĉi-jare ricevis tradukojn en la latva kaj araba lingvoj kaj estas jam certe lernolibro nesuperebla de iu ajn alia per nombro de tradukoj. Precipe al tiu lasta mi deziras merkatan sukceson, al kiu certe multe kontribuos Renato Corsetti.

**Paweł Fischer-Kotowski**

La teksto aperas samtempe en Parenteze.net

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2018/01/17/la-libroj-de-la-jaro-2017/>

## Du homoj babiladas

**K** iujn lingvojn vi lernis?  
-- Ĉu devigite, aŭ memstare?  
-- Devigite.  
-- En la bazlernejo mi lernis la rusan lingvon kvin jarojn.  
-- Certe nun vi perfekte scias ĉi lingvon. Ĉu ne?  
-- Vi eraras. Vane mi lernis ruse, hodiaŭ mi scias el ĝi preskaŭ nenion. Mi forgesis la lernitan lingvon.  
-- Ĉu vi neniam uzis ĝin en praktiko?  
-- Unufoje mi ekprovis, sed sensukcese. Mi ne povis komprenigi min.  
-- Rakontu, kiel okazis!



-- Mi feris ĉe la Balatono kaj renkontiĝis kun polino. Pensante ke per la rusa lingvo mi povos

komprenigi min. Ja ankaŭ la pola estas slava lingvo kaj certe la bela polino komprenos min. Komence tio ŝajnis glata afero, kaj mi ekamindumis. La prezentiĝo okazis sukcese. Mi eksciis baldaŭ, ke ŝi nomiĝas Jadviga, kaj loĝas en la belega, historioriča urbo Krakovo. Bedaŭrinde post la sukcesa konatiĝo mi mutiĝis. Mi nur balbutis. Apenaŭ mi povis elbuŝigi kelke da bagatelaj vortoj.

## de Apáti Kovács Béla, el Hungario

-- Kio okazis poste?  
-- Kio okazis? Nenio. Ni ne povis komuniki. Fine la bela polino malaperis, forlasis min.  
-- Kial vi ne provadis per alia lingvo? Eble ŝi sciis angle aŭ germane.  
-- Bedaŭrinde neniun lingvon komunan ni parolis. Vane mi provadis. Ŝi ripetadis ion. Mi ne sciis, kio ĝi estas.  
-- Kio estas tiu ĉi vorto? Eble mi povas traduki.  
-- Se mi ĝuste memoras, tiu vorto aŭdiĝis simile. Sed eble mi eraras.  
-- Nu, diru jam!  
-- Esperant, aŭ esperantki. Ĉu vi scias, kio ĝi estas? Mi ankoraŭ ne aŭdis ĉi vorton. Mi ne scias, kion ĝi signifas.  
-- Ankaŭ mi ne aŭdis ĉi vorton. En kiu lingvo ĝi estas? Al neniun lingvo ĝi similas. Esperant, esperantki, kio ĝi estas? Kial ŝiris tion tiu ĉarma polino. Estus bone scii. Ĉu ne?  
-- Mi konsentas. De kiu ni povus demandi, kion ĝi signifas?  
-- Mi ne scias. Ne gravas. Jam mi forgesis ŝin. En la estonto mi ellernos lingvojn por ke mi ne travivu similan ĝenan situacion.  
-- Bonega ideo. Ni lernu fremdajn lingvojn!  
-- Do, ek al la lingvolernado!



verkis: **Apáti Kovács Béla** el Hungario

## Atentu vian animon mia frato

**P**ost multaj horoj de vojirado, abato Amono vidis proksime kelkajn arbojn. La loko estis tre varma kaj dezerta, ke feliĉe li trovis tiujn ĉi arbojn kaj li decidis halti tie por iomete ripozi kaj manĝi.

En tiu ĉi regiono estis monaĥejo kun multaj ĉeloj ekstere de ĝi. En unu ekstera ĉelo loĝis iu monaĥo kiu havis malbonan famon. La aliaj monaĥoj akuzis lin, ke li havas amrilaton kun iu virino, kiu hodiaŭ estis vizitanta lian ĉelon. Tiun ĉi viziton la monaĥoj sciiĝis kaj okazis granda maltrankviliĝo en la monaĥejo.

Ĉiuj monaĥoj de la monaĥejo kune kun tiuj de la eksteraj ĉeloj kunvenis kun la celo forpeli la pekantan monaĥon de sia regiono.



Ili estis irantaj al la ĉelo de la pekulo kaj ilia vojo pasis de la arboj kie abato Amono estis ripozanta. Alproksimiĝante ili vidis la abaton, kiu estis manĝanta sub la arboj sed ili ne klare vidis, kiu li estis. Kiam ili proksimiĝis, ili tre surpriziĝis

## sendis Georgos Leventidis, el Grekujo

ĉar tiu abato estis episkopo Amono. Post ilia surpsiziĝo foriris ili rakontis al li kial ili estis tiom maltrankvilaj, do ili petis, ke li venu kun ili por embuski la pekulon kaj forpeli lin.

Abato Amono konsentis iri kun ili, do ĉiuj ekiris al la ĉelo de pekulo. Sed la peka monaĥo vidante ilin el la fenestro trovis tempon por kaŝi la virinon en unu grandan terkruĉon. Antaŭ ol la aliaj atingis la ĉelon, unue alvenis la abato, kiu tuj sentis kaj komprenis kio faris la pekulo. Do iris rekte al la granda terkruĉo kaj eksidis sur ĝin.

Tiam li ordonis al la aliaj serĉi ĉie kaj ĉion, do ili serĉis dum longatempo sed ne sukcesis trovi la virinon aŭ iun alian pruvosignon por atesti la kulpecon de la monaĥo. Do abato Amono ordonis al ĉiuj monaĥoj haltigi la serĉadon dirante, ke li esperas, ke Dio pardonos ilin pro ilia suspektemo kaj ordonis, ke ĉiuj foriru de la ĉelo.

Post la aliaj foriris abato Amono restis sola kun la monaĥo kaj kaptante la manon de la monaĥo diris al



>>>

**E**n tiu ĉi jaro Slovakio rememoras la 130an datrevenon de naskiĝo de Martin Benka, kiu okupas apartan lokon inter la slovakaj pentristoj de la 20-a jarcento. Benka estis grafikisto, ilustristo, desegnisto, artaĵpedagogo kaj esperantisto, kaj unu el la fondintoj de la slovak pentroarto. Laŭ Benka, la naturo estas intime ligita kun homa agado. Pro tio gravan lokon en liaj pentraĵoj havas la pejzaĝo.



Benka naskiĝis la 21an de septembro 1888 en la vilaĝeto Kostolište, ĉirkaŭ 40 km okcidente de la ĉefurbo Bratislavo, en ĉarpentista familio. Li ellernis la farbistan metion en la ĉeĥa urbo Hodonín kaj poste laboris kiel farbisto-kolorigisto en diversaj konstrufirmaoj en Vieno.



Sed la kolorigista metio ne estis lia vivcelo. Pro tio li pasigis du jarojn en privata lernejo ĉe ĉeĥaj pentristoj. Li ellaboris propran artan stilon ligitan al la naturo kaj la homo. Jam lia unua pentraĵo Suna mateniĝo en arbaro, ekspoziciita en la praga Domo de

Artistoj en 1913, rikoltis grandan sukceson.

Post 39 jaroj li forlasis Pragon kaj ekloĝis en la slovak urbeto Martin. Tie la urba estraro konstruigis al li domon kun ateliero kaj muzeo pri pentraĵoj. Reciproke Benka transdonis al la ŝtato sian bazan kolekton de pentraĵoj – pli ol 5200 proprajn verkojn,

kiuj formis la artfonduson de la hodiaŭa muzeo de Martin Benka.

Benka multe veturis kaj pentris en diversaj regionoj de Slovakio. Tamen sukceson kaj agnoskon li trovis en pluraj landoj. Ekspoziciataj estis liaj pentraĵoj en Aŭstrio, Belorusio, Ĉeĥio, Germanio, Hungario kaj Rusio.



Benka estis universala artisto. Li okupis sin ankaŭ pri arĥitekturo, grafiko, ilustrado de tekstoj, muzika komponado kaj desegnado de poŝtmarkoj. Inspirita de kubismo li eĉ mane fabrikis 13 violonojn. Popularaj restas liaj ilustraĵoj de naciaj popolaj rakontoj.

Eĉ li esperantistiĝis 59-jaraĝa, pentris serion de ilustritajn poŝtkartojn kun Esperantaj tekstoj. Li kontribuis al la slovak revuo Esperantisto Slovaka kaj verkis kvar Esperantajn rakontojn: Pri slovak arto, La akvoguteto, Ruĝaj diantoj kaj Stranga koncerto.

Okaze de sia 65a naskiĝdatreveno Benka akiris la prestiĝan titolon “nacia artisto” – la unua slovak pentristo tiel titolita. En 1963 li ricevis respublikan ordenon pro sia dumviva artistika laboro. Li estis unu el nur kelkaj reprezentantoj de la moderna pentroarto, kiuj favore akceptis la komunistan reĝimon en la iama Ĉeĥoslovakio.

Benka mortis en 1971 kaj estis entombigita en la nacia tombejo en Martin. En lia slovak naskiĝa vilaĝeto estas kreita memorĉambro pri liaj vivo kaj verkaro, kie vizitantoj povas trovi originalajn pentraĵojn.

verkis Julius HAUSER, el Slovakio



>>> li : “atentu vian animon mia frato” kaj sen diri ion alian li foriris el la ĉelo al sia vojo.

La spirita abato montris tiom da kompaton kaj amon al la frato, kaj ankaŭ faris, ke la aliaj senti grandan honton ĉar ili tiel facile kredis je la akuzoj kontraŭ li, kaj samtempe kiam li kaptis la manon de la perdiĝinta frato kaj diris al li : “atentu vian animon mia frato”, la frato tuj sentis honton kaj piecon kaj la

filantropio kaj simpatio de la abato pasis tuj en la animon de frato.

Tradukis en Esperanto Georgios Leventidis el la libreto “La Pasio de Kritiko” de la monaĥo Gregorio el la Sankta Monto

## Krucvortenigmo



### Horizontale

1. Manĝaĵo konsistanta el viando, muelita, spicita kaj enŝovita en pretigitajn maldikajn intestojn (bestajn, ekz. de porko, aŭ artefaritajn), poste dividitajn en mallongajn cilindrojn per ligtordo; (inverse) Tiu tempopeco, kiu pasas dum unu plena rotacio de Tero ĉirkaŭ sia akso.
2. Tre fervora, pasia; Delikata, agrabla kaj subtilaodoro de kelkaj plantoj aŭ aliaj substancoj.
3. Interjekcio uzata por esprimi iom malŝatan senzorgecon; En la relativa solfeĝo la sesan tonon super la toniko; La unua duono de oficiala dokumento atestanta gravan faron aŭ decidon.
4. Konsistanta el unu longa kaj unu mallonga (aŭ unu akcenta kaj unu senakcenta) silabo; Pseŭdonimo de Eŭgeno Adam (1879—1947), aktivulo de la E-ista laborista movado, la plej grava el la unuaj pioniroj de SAT.
5. La 21a grafemo de la E-a alfabeto; (inverse) Manartiko.
6. (inverse) Nomo de la cifero 8; Mensa konsento pri religiaj aŭ filozofiaj opinioj, kiujn oni rigardas veraj, kvankam ne demonstreblaj; (inverse) Metal' rigardata kiel tre multevalora kaj tial uzata en juvelarto, monfabrikado ks.
7. Part' de la metafiziko, studanta la problemojn pri la esto ĝenerale, sendepende de ĝiaj ŝanĝaspektoj, kaj pri ĝia unua kaŭzo; Pagil' uzata kiel interŝanĝilo en aĉeto kaj vendo.
8. Konstruaĵo por homloĝado; Silabo, kiu montras en la relativa solfeĝo la kvaran tonon super la toniko.
9. La sankta libro, laŭtradicie diktita de la ĉefanĝelo Gabrielo al Mahometo; Pezo de ĉia entenantaĵo (kesto, sako, botelo ktp), en kiu estas enpakita ia varo aŭ kemiaĵo.
10. Alpremi la lipojn al io, por esprimi respektan amon aŭ admiron; En sporto kurejo aŭ veturejo.

### Vertikale

1. Senpartia juĝo pri literatura aŭ arta verko; Subjunktio, enkondukanta kompletigajn propoziciojn, kun rolo de subjekto.
2. Arkoforma akvomasa, kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro, lago, ks, sub la blovo de la vento.
3. Produktocela penad' aplikita al difinita farotaĵo; Radioaktiva element' kun simbolo Th.
4. Parto de la supra (aŭ antaŭa) membro de homo kaj simio, de la ŝultro ĝis la kubuto; lo havanta ĉiujn ecojn

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1								■				
2		■					■					
3		■			■			■		■		
4						■						
5		■			■		■					
6			■	■	■					■		
7									■			
8	■					■		■			■	
9							■					■
10		■					■					

similajn al tiuj de io alia.

5. Sufikso esprimanta daŭran agon; Estigi ĉelaron aŭ individuaron, kies ĉiuj ĉeloj aŭ individuoj estas genare identaj, ĉar devenantaj el la sama ĉelo aŭ individuo.
6. Sumo periode pagata, laŭ difinita laborkontrakto, de mastro, entrepreno ks al dungito, por kompenso de la farita laboro; (inverse) La dekkvina grafemo de la E-a alfabeto.
7. Plej forta, plej intensa, ekstrema.
8. (inverse) Statu' prezentanta pli-malpli krude homfigurajn diaĵojn kaj honorata per privata aŭ publika kulto; (inverse) Senvokala, precize difinita tempo, en kiu okazis, okazas aŭ okazos fakto.
9. Parto de la korpo, adaptiĝinta al speciala vivofunkcio; Prepoziciaĵo, enkondukanta la aganton post substantivo, esprimanta agon.
10. Lud' inter du personoj, unu disponanta 181 nigrajn, alia 180 blankajn globetojn, ludotajn sur tabulo kun 361 krucpunktoj; Sufikso almetebla post iu el la kvin unuaj fonemoj de virina propra nomo aŭ nomo de parenceco, por formi karesformon; Vasta etendaĵo da sala akvo, kiu kovras la plej grandan parton de la terglobo, ofte kontraste kun la seka tero aŭ la sensala akvo.
11. Tiu, kiu praktikas sportan, artan ks aktivecon, ne estante specialisto, profesiulo; Unu' de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj kun simbolo  $\Omega$ .
12. Oligoelementa planlingvo de Sonja Lang.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)

## Ŝercoj



— Kio estas virinokomercisto! — demandas maljuna edzino sian edzon.  
 — Tia ulo, kiu vendas virinojn por erotikaj celoj.  
 — Ĉu li vendus ankaŭ min?  
 — Karulino, ne interniksu virinokomerciston kun antikvaĵisto!

\* \* \*

— Malbona estas la bremsilo de mia aŭto. Bonvolu ripari ĝin.  
 — Estas en ordo. Ĉi semajnofine ĝi pretiĝos.  
 — Ĉu pli frue?  
 — Bedaŭrinde ne.  
 — Sed ĝi estus treege urĝa.  
 — Se ĝi estas tiom urĝa, vi ne bezonos bremsilon.

\* \* \*

Kanibaloj trovas ĉerkon sur la vojo. Iu rimarkas:

— Denove ni manĝos konservaĵon!

Ĉu vi deziras unue aperitivo ?



Mi tuj demandas, sed mi opinias, ke ni ne havas ĝi...



## Al memoro de la japana katastrofo (11-an de marto 2011)

Elena Popova el Bulgario

Cunam' en paca  
golfo. Senfortaj digoj.  
Regis la akvo.

Ceremonio  
en la mezlernejo. Ja  
la viv' daŭras.

Trovita foto  
de l'rideta junulin'.  
Espero pri viv'.

Budha statuo  
gardas senhoman urbon.  
Senfortaj preĝoj.

Urboj sen domoj.  
Senvoĉaj ruinoj. Kot'.  
Terura silent'.

Senvoĉaj preĝoj  
de la ŝtonaj budhoj. Nur  
ombro de l' arboj.

Sub la ĉielo  
monumento "Burĝono".  
La viv' ekfloras.

Estis pinarboj.  
"Pinarbo de espero"  
kreskos en parko.

Roza dorsosak'.  
Neniigita esper'.  
Larmoj pro dolor'.

Iu tomboŝtono,  
sen kapo kaj man', tenas  
bebon. Tristeco.

Bela lernejo.  
Senmortaj gelernantoj.  
Floroj kontraŭ mort'.

Monumento ĉe  
la fermata lernejo.  
Himno pri esper'.

La tero tremas.  
Haltis l' horloĝoj. Koroj,  
plenaj kun zorgo.

Ĉiama natur'-  
floras la hortensioj.  
La viv' ne mortas.

Nom' al fervojo –  
"Sonĝlinio Galaksi".  
La esper' vivas.

Golfo Tooni.  
Novaj digoj pri defend'.  
Florantaj arboj.

Maljunuleo.  
Vanaj litoj kaj seĝoj.  
Kotaj postsignoj.

Eksa vilaĝo –  
nun herbaĉoj ĝin kovras.  
Nuklea ventflu'.

Fotoj en templo  
De l'Dua mondmilito.  
Trista memoro.

Dezerta loko.  
Post la cunam' caras nur  
diversaj herboj.

Malapera urb'  
pro la forta cunamo.  
Neĝ' sur l' ruinoj.

Post la cunamo-  
senvoĉa atestant'- ŝip'.  
Tie estis urb'.

Lernejo post la  
nuklea akcidento.  
Solecaj ĉambroj.

Nova defendo –  
pli altaj digoj. Kredo  
pri sekura vivo.

Kot' ĝis la kvara  
etaĝ'. Rompitaj mebloj,  
kiel fantomoj.

Rivero Kaŝŝi-  
post kvar jaroj denove  
gajas al salmoj.

Kiu muzikas  
per ruĝaj kordoj, kiel  
sango? Ĉu l'esper'?

Hakitaj arboj,  
mortaj bestoj, ŝtonpecoj.  
Vidaĵ post plago.

Estis templo. Nun-  
ŝtonoj. En la fontoj  
naĝas salmoj. Viv'...

Eksa urbeto.  
Skelet' de oficejo.  
Griza ĉielo.

Ŝtonhundoj restis  
post la cunam' kaj fajro.  
Tristaj vizaĝoj.



**DUA PARTO - LA VIVO**



**38**

Kiu fidas al supera VIVO,  
 tiu scias nenion pri la VIVO;  
 tial li havas VIVON.  
 Kiu ne fidas superan vivon,  
 tiu provas ne perdi la VIVON;  
 tial li ne havas VIVON.  
 Kiu fidas superan vivon,  
 tiu ne agas kaj ne havas intencojn.  
 Kiu ne fidas superan VIVON,  
 tiu agas kaj havas intencojn.  
 Kiu fidas la amon, tiu agas, sed ne havas  
 intencojn.  
 Kiu fidas la justecon, tiu agas kaj havas  
 intencojn.  
 Kiu fidas la virton, tiu agas,  
 kaj se iu ne respondas al li,  
 li gestas per zigzagantaj brakoj kaj alvenigas  
 tiun.  
 Tial: Se TAŬO estas perdita, aperas VIVO.  
 Se VIVO estas perdita, aperas la amo.  
 Se la amo estas perdita aperas la justeco.  
 Se la justeco estas perdita, aperas la moro.  
 La virto estas la mizero de fido kaj kredo  
 kaj la komenco de l' konfuziĝo.  
 Antaŭsciado estas la ŝajno de TAŬO  
 kaj la komenco de l' malsaĝeco.

Tial la vera homo restadas ĉe la tuto  
 kaj ne ĉe mizera parto.  
 Vera homo loĝas en la estado kaj ne en la  
 ŝajno.  
 Tia homo ignoras la ŝajnon kaj tenas sin al la  
 ĉi tiea.

**Rimarkoj de Cezar**

Denove interesa legaĵo. Se TAŬO, tio, kio kuntenas ĉion, kio  
 efikas en ĉio, estas perdita, aperas la vivo, se tio malaperis,  
 la amo, se ĝi malaperis, la justeco. Certe multaj homoj scias  
 aŭ divenas tion, sed kiom da ili agadas laŭ tio? Certe ne  
 multaj. Kaj eĉ malpli da homoj konscias, ke la virtoj kaj leĝoj  
 estas jam la komenco de l' konfuziĝo. Ĉar en libera socio  
 neniu plu parolos pri tio, kio estas ĉiutaga normaleco.

Interese estas ankaŭ, ke la amo ĉe Laocio estas evidente  
 nur triaranga, do tute ne unuaranga, kiel ĉe hipokritaj  
 ŝlagrokantistoj en Eŭropo. Certe la majstro ankaŭ tiurilate  
 tute pravas. Unue ni devas esti naskitaj, poste vivi je daŭro,  
 kaj tiam ni povos ankaŭ ami iun.

Anniespera atentigas pri tio, ke en la originala ĉapitro temas  
 rilate al VIVO pri "supera virto", fonetike: "shang de" kaj  
 "malsupera virto", fonetike "xia de". Rikardo Vilhelmo  
 laŭvorte tradukis tion tiel: "Kiu tenas alte (aŭ malalte) la  
 vivon", sed li celas kiel Wang Chongfang superan kaj  
 malsuperan virton.

(daŭrigota)

**Dankon Amiko (14) - de Claude Piron**

**- mez-nivela**

**(18)**



Rikardo turnis sin. Iu kuris post li,  
 kaj li forte sentis la neceson esti plej  
 singarda. Sed li tuj malstreĉiĝis.  
 Estis la fortulo, kiun li liberigis el la  
 ŝranko.

“Tie ĉi vi jam estas! Diable! Vi  
 rapidas!” tiu diris.

“Vi rapidas ne malpli,” Rikardo rebatis. “Kio  
 okazas? Kial vi ne iris dormi tuj?”

“Se vi scius, kiom mi tion deziras! Sed ili ne lasis  
 min. Post kiam vi foriris, mi komprenoble tuj telefonis  
 al Sekuriks. Ili opiniis, ke vi ankoraŭ ĉeestas, kaj volis

urĝe paroli kun vi. Mi diris, ke mi tuj iros transdoni ilian  
 komunikon, kio ajn ĝi estu, sed ke mi unue devas  
 raporti, kio okazis al mi. Estas grave, ke ili sciu, al kiaj  
 danĝeroj ni elmetas nin. Tio donos al ili pli sanajn  
 ideojn pri la monvaloro de nia laboro.”

“Kaj kio estas tiu informo, kiun vi devas transdoni al  
 mi tiel urĝe?”

“Mi ne scias, al kio ĝi rilatas. Estas simple, ke tuj  
 post via rondirado vi iru al la ĉefpolicejo, kie oni  
 atendas vin.”

La junulo ekstremis. Malplaĉaj pensoj pri lia  
 laborpermeso envenis lin neforjeteble.

(daŭrigota)

p.29 > ŝtataj fervojoj perdis lokomotivon (ĝi malaperis de la  
 tersurfaco aŭ pli precize de la ranĝstacio), mi  
 komprenis, ke mi fariĝis viktimo de neetika transakcio.  
 Tial mi montris rezervemon por la vendisto, kiam mi  
 revidis lin en la vilaĝa drinkejo. Tiam li volis vendi al mi  
 takelon, sed mi ne plu pretis komerci kun li -- kaj

cetere: por kio mi bezonas takelon?

Tradukis el la germana **Wolfgang Kirschstein**

Fonto: **La Ondo de Esperanto. 1999. N°3 (53).**



### Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli


### Charles Darwin (1809-1882)

“Ĉu vi estas parenco kun simioj el via patra aŭ patrino flanko?” Jen moka demando kaj diskuto farita en la muzeo pri la historio de naturo en Londono en la jaro 1860. Fakte jes, laŭ Darvino ni estis parencoj kun similformaj prabestoj el ambaŭ flankoj. Tion Darvino verkis en sia libro “La origino de specioj”, kiun li publikigis en la jaro 1859 kaj ekflamis tiaj diskutoj ĉar ne plu estis eble pensi, ke homoj estas apartaj de la besta reĝlando. Homoj ne plu estis specialaj kaj ĉiuj en la Viktorina tempo estis ŝokitaj.

Por kompreni kiom proksimaj ni estas al la simioj sufiĉas dediĉi kelkajn horojn ĉeesti kune kun ili. Sed tiam ĉiuj pensis, ke la ideo de Darvino estis freneza kaj satana. Religio estis kontraŭ tiu ideo kaj homoj ne kredis je la evoluo de la vivuloj.

Darvino ne estis filozofo sed biologo kaj geologo. Li estas parto de nia serio pri filozofoj ĉar liaj ideoj impresis tre multe la postajn filozofojn. La teorio de evoluo eble estas la plej efektiva teorio en la homa historio. La teorio eksplikas kiel la plantoj kaj vivuloj alvenis al siaj nuntempaj formoj kaj kiel ili ankoraŭ ŝanĝiĝas. Do, la teorio kontraŭis la religiajn vidpunktojn kaj faciligis la ideon ke Dio ne ekzistas. Zoologo Richard Dawkins diris, ke li tute ne kuraĝus esti ateisto antaŭ la publikigo de tiu teorio. Tamen oni ne bezonas esti ateisto por kredi je tiu teorio. Multaj religiemaj homoj kredas kaj apogas la teorion de Darvino.

Darvino en sia juneco veturis dum kvin jaroj per la ŝipo HMS Beagle al Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio. Antaŭ tio li ne estis tiel brila studento kaj neniu pensis, ke li formus tian efektan teorion. Li provis fariĝi doktoro sed ne sukcesis do li komencis studadon por fariĝi pastro. En sia malplena tempo li kutimis kolekti insektojn kaj herbojn sed neniu atendis, ke li fariĝus tiom granda biologo. La veturado per la ŝipo Beagle ŝanĝis lin. La celo de ĉi tiu vojaĝo parte estis krei la



mapon de tiuj landpartoj, kaj li rolis kiel plantologo. Do kvankam li ne estis tiel kompetenta homo li kolektis kaj zorgis ekzamenis ŝtonojn, plantojn, fosilojn kaj bestojn kie ajn ili surteriĝis, kaj li sukcesis sendi la grandan parton de tiu kolekto al Britujo por esti poste ekzamenita. La plej interesa parto de ĉi tiu vojaĝo estis la insuloj de Galapagoj, 500 miloj for de la okcidenta marbordo de Sudameriko. Ili atingis la insulojn en la jaro 1835 kaj trovis tre interesajn bestojn sur la insuloj. Li ĉefe ekzamenis la birdetojn sur la insuloj.

Kiam li revenis al Britujo li forlasis la ideon fariĝi pastro kaj komencis studi sian kolekton. Dum tiu studado li konkludis, ke la vivuloj neniam stagnas sed ili estas en daŭra ŝanĝiĝo kaj evoluo por adapti al sia ĉirkaŭaĵo. Tiuj vivuloj, kiuj sukcesas bone adaptiĝi al la ĉirkaŭaĵo vivas sufiĉe longe por pasi siajn trajtojn al siaj postaj generacioj. Kaj post longa tempo la aspekto kaj trajto de la speco ŝanĝiĝas kaj tiel evoluas. Li konstatis ke la fringoj<sup>1</sup> kiuj vivas sur la insuloj fakte havis malsimilajn trajtojn de tiuj kiuj vivas en aliaj lokoj. Ne ĉiuj birdoj de la sama speco estas samaj sur nia tero. Ekzemple se ili vivas en izolita loko, kie ekzistas nur malmolaj semoj por manĝi, tiam iliaj bekoj aliformiĝas kaj adaptiĝas al tia manĝaĵo ĉar ili tiel survivas la malfacilaĵon.

Antaŭ Darvino kelkaj aliaj biologoj asertis ke vivuloj sur la tero evoluas sed tio, kion Darvino aldonis kaj faris teorion estis la “natura selektado rezultanta el konkurenco por nutriĝo kaj/aŭ reproduktiĝo kiu kaŭzas la evoluon de la specioj”. Evoluo okazas aŭtomate, sen iu ajn plano kaj decido, do ĝi estas blinda kaj senpripensita procezo.

Li prezentis sian teorion en la jaro 1859 kaj post nelonge li publikigis sian libron “La origino de specioj” en la jaro 1859. Tiu teorio faris lin fama sed multaj homoj ne kredis je lia teorio. Sed sciencistoj ja apogis tiun teorion per aliaj trovaĵoj, ekzemple per la “genetika heredaĵo” aŭ per la “fosiloj” trovitaj sur la tero. Do, la teorio pri la evoluo kaj la natura selektado nuntempe estas pli ol nur teorio. Sed Darvino estis malfermita pri la ideo de la ekzisto de Dio ĉar li diris, ke lia teorio tute ne estas sufiĉa por konkludi la neekzistadon de Dio.

<sup>1</sup> **fring/o** : de birdoj el la ordo de paseroformaj, kun mallarĝa malsupra duonbeko kaj fendita vosto.

(daŭrigota)

**L**a Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko pasintjare havis pli ol 20.000 vizitantojn. Tio estas rekordo por la muzeo, kiu estis fondita antaŭ 90 jaroj, rakontas la estro de la muzeo, Bernhard Tuider.

La Esperanto-muzeo situas en la centro de Vieno, unu el la plej grandaj urboj en Eŭropo. Tial ĝi estas rimarkata de multaj personoj kaj ankaŭ estas tre grava pordo al la publiko. Dum la pasintaj jaroj la nombro de vizitantoj daŭre kreskis.

En 2017 rekorda nombro da 21.256 personoj vizitis la Esperanto-muzeon, kompare kun la jaro 2016 (15.937) tio estas rimarkinda plialtiĝo de 33 %, kompare kun la jaro 2006 (5.025) eĉ 323 %.

Inter la vizitantoj estas ne nur personoj el Vieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, precipe gelernantoj kaj gestudentoj, sed ankaŭ multaj turistoj. Same daŭre venas esperantistoj el diversaj partoj de la mondo en la Esperanto-muzeon, kiu – fondita en 1927 – konservas kaj disponigas mondscale la plej ampleksan kolekton pri Esperanto kaj planlingvoj.

**Tiu ege pozitiva** evoluo baziĝas precipe sur la pliampleksigo de la deĵorhoroj, la enkonduko de novaj laŭaĝaj ateleroj kaj sur eventoj kun specialaj laŭtemaj gvidadoj.

Ĉiujare la Esperanto-muzeo – kaj la kvar aliaj muzeoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko – partoprenas plurajn naci- kaj internacikadrajn kulturajn aranĝojn.

Dum la “Longa Nokto de la Muzeoj” kaj la “Tago de la Malfermita Pordo” ni proponas specialajn gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn. Dum la “Tago de la Monumentoj” kadre de la Eŭropaj Tagoj de kultura heredaĵo ni precipe parolas pri Esperanto kadre de varia speciala temo: 2014 Illusion (“Iluzio”), 2015 Feuer und Flamme (“Fajro kaj flamo”), 2016 Gemeinsam unterwegs (“Kune survoje”), 2017 Heimat großer Töchter (“Patrujo de elstaraj filinoj”), 2018 Schätze teilen (“Dividi trezorojn”).

Ekzemple en 2017 ni pli koncentris nin pri la elstaraj filinoj ol pri la patrujoj kaj informis pri “Lidja Zamenhof kiel eminenta filino” memorigante pri la 75-a datreveno de ŝia morto.

**Por lernejoj klasoj** la Aŭstria Nacia Biblioteko ofertas aĝospecifajn programojn, la tiel nomatajn “Wissenswelten” (sciomondo), pro kiuj dum la pasintaj jaroj pli kaj pli da infanoj kaj gejunuloj ĝuis gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn.

Ankaŭ grupoj de plenkreskuloj – precipe universitatoj – volonte kaj regule mendas Esperanto-kurson aldone al gvidado.

Tiel ĉiujare inter 40 kaj 50 grupoj ricevas dum 30, 60 aŭ 90 minutoj bazajn konojn pri Esperanto, ili povas efektuple sperti, ke la lingvo bone funkcias, kaj ili ankaŭ ekscias, ke ĝi estas ĉiutage uzata en nia instituto – de dungitoj kaj de vizitantoj esperantistoj.

Krome vizitantoj povas percepti, ke la Esperanto-muzeo estas ne nur muzeo, sed – ekde sia fondo en 1927 – ankaŭ biblioteko kaj arkivo, kiu nuntempe konservas kaj disponigas jenan havaĵon:

- \* 40.000 faldfolioj
- \* 35.000 volumoj
- \* 25.000 gazeteltondaĵoj, precipe el la tempo 1900–1920
- \* 22.000 fotoj kaj fotonegativoj
- \* 10.000 manuskriptoj kaj aŭtografoj
- \* 3.700 diversaj periodaĵoj
- \* 3.000 muzeaj objektoj
- 1.500 afiŝoj
- \* 850 aŭd-vidaj materialoj
- \* 56 antaŭlasaĵoj, postlasaĵoj kaj arkivoj (de asocioj, eldonejoj kaj revuoj)

Se oni konsideras, ke la Esperanto-muzeo disponas pri ekspozicia spaco de nur 80 kvadratmetroj, la statistiko estas elstara: ekde 2005, kiam la nova ekspozicio en Herrengasse 9 estis inaŭgurita, vizitis ĝin pli ol 130.000 personoj, okazis preskaŭ 700 gvidadoj kaj pli ol 350 Esperanto-fulmkursoj (regule nur ekde la jaro 2009), kiujn partoprenis entute pli ol 8.000 personoj.

Pli da informoj troveblas en la retejo de la **Kolekto por planlingvoj** kaj en la retejo de la **Esperanto-muzeo**.

**Bernhard Tuider**

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2018/01/16/vizitrekordo-ce-la-esperanto-muzeo-en-vieno/>





**O**ni propagandas Esperanton kaj tre ofte miras kaj plendas: kial la rezulto evidentiĝas tre modesta. Ni provu rezoni laŭ nuntempaj principoj...

Propagando estas nenio alia ol reklamo, kaj oni jam komprenis, ke la reklamo devas esti adresita. Senutilas reklami luksajn aŭtojn en gazeto por senlaboruloj... El tiu vidpunkto plejparto de nia propagando de Esperanto absolute vanas.

Luj fieras pri sia bru-aktivado dum «Ago-tagoj» – tamen kiel tio aspektas deflanke? Jen severmiena junulo kun nigra barbo kuradas tien-reen, svingante per verda flago (li volis nur varmiĝi, sed kiu tion sciis?), sed la preterirantoj supozas lin esti ĉeĉena ekstremisto. Jen aĝa dommastrino vidas homgrupon kun plakatoj kaj scivole demandas: kion ili volas? Oni pacience klarigas al ŝi pri lingva egalrajteco, pri libera komunikado, pri nia bela lingvo. Ŝi ĉion aŭskultas kaj konkludas: «Ha, do tio estas kontraŭ la ortodoksa religio!» (Mi priskribis realajn okazojn en Moskvo).

La samon pruvas la negativa sperto de Sergej Paŝomov (LOdE, 1998: 11) – proponi Esperanton al «piaj» kredantoj senutilas, ĉar ili ne kapablas percepti tion, kio estas ekster ilia doktrino kaj ne servas rekte al ĝi. Oni propagandu/reklamu/informu pri Esperanto al tiuj, kiuj povas pri ĝi reale interesiĝi, unuavice – al saĝaj homoj, havantaj aŭ havontaj gravan pozicion en la socio... (Tamen, en la Ŝtata Dumao plejparto de la deputitoj pensas nur pri propra bonstato kaj memreklamo – do apenaŭ estas senco dissendi priesperantajn alvokojn al ili ĉiuj inkluzive de la malkaŝaj naciistoj)

Mi klopodas agi tiudirekte.

Dum pluraj jaroj mi aktivis en intelektaj ludoj, inkluzive de la televidaj. Kiam mi aperas sur TV-ekrano kaj havas okazon ion diri pri mi – mi mencias Esperanton. Gravus ankaŭ: kiel mencias. En 1994 en Propra ludo nelonge antaŭ mi ludis du esperantistoj. La redaktoro decidis, ke pri Esperanto jam estis dirite sufiĉe kaj avertis, ke mi rakontu pri io alia. Do kiam en etero oni demandis min pri miaj hobiaj, mi rakontis pri la plej ekzotika – kolektado de trambiletaj – kaj aldonis: «mi havas ankaŭ aliajn hobiajn, sed ili estas tute neoriginalaj – ekzemple, la lingvo Esperanto...» Iom poste mi persvadis la redaktoron uzi en Propra ludo apartan temon «Esperanto», verkis por ĝi simplajn demandojn. Ludantoj respondis korekte – kaj en ilia subkonscio fiksiĝis pozitivaj emocioj ligitaj kun nia lingvo; la spektantoj eksciis kelkajn novajn faktojn... Kiam venas mia vico verki demandojn por turniro de Kio? Kie? Kiam?, mi nepre enmetas

interesan (kaj respondeblan por «flanka» homo) demandon pri Esperanto.

Mi celas, ke oni sentu, ke Esperanto estas ne ia rara ekzotikaĵo, sed plenvolara kaj reale uzata lingvo. Pri tio konvinkiĝis ankaŭ la partoprenintoj de Interret-turniro (LOdE, 1998: 8–9). La vigla diskuto pri fidindeco de la fontoj fine ne lasis dubojn, ke Esperanto reale vivas. Tion jam scias kelkcent uzantoj de Interreto – kaj ili pli gravas, pli rimarkeblas en la mondo, ol kelkcent dommastrinoj, interesiĝantaj nur pri Sankta-Barbara.

Pluraj intelektludantoj estas ligitaj kun universitatoj, eldonejoj ktp., kaj dank'al amikaj rilatoj eblas ricevi tie «tribunon». La tasko pri Esperanto unuavice dum multaj jaroj eniris la lingvistikan olimpikon (LOdE, 1998: 1). Poste la samaj lingvistoj, vidante mian entuziasmon, proponis al mi verki artikolon pri Esperanto por la Porinfana enciklopedio de la eldonejo Avanta+. Do nun ni havas 100 mil ekzemplerojn de la volumo kun ampleksa, informriĉa kaj favora artikolo pri Esperanto. Ĉar la enciklopedio havas altan prezon, ĝi estos gardata dum jardekoj kaj trafos unuavice al idoj de «elituloj», havantaj pli grandajn ŝancojn iam okupi influhavajn poziciojn en la lando. Ankaŭ pluraj intelektludantoj, famaj antaŭe, nun havas altajn postenojn – ĝis registaraj konsilistoj. Mi tre esperas, ke dank'al tio post 10–20 jaroj Esperanto en nia lando estos pli favorata.

Necesas provi diversajn manierojn de propagando – tamen tre gravas, ke oni ne perceptu nin kiel fanatikulojn. Oni lernu paroli kun homoj pacience, sen trudo, konsiderante iliajn interesojn. Ja religiaj misiistoj tiel agas, kaj (al mi tio tre malplaĉas, sed endas agnoski la objektivan rezulton!) ili sukcesas pli multe ol niaj propagandistoj.

Tre interesa kaj utila estas la kolportista sperto de Vladimir Ĉernov (LOdE, 1998: 11). Lia Esperanto-kurseto estas sprita kaj alloga, tamen ĝi plibonigeblas. En similaj situacioj oni nepre konsideru la konatan psikologian fenomenon: ĉion ricevitan senpage oni povas tuj forĵeti, sed al aĵoj aĉetitaj oni rilatas pli atente. En trajnoj kaj diversaj atendejoj oni kutime enuas, havante amasegon da libera tempo – do ni kaptu la okazon!

Kion plian oni povas fari surloke? Iri al «elitaj» lernejoj, gimnazioj, liceoj k.s. (nur ne religiaj), tie la instruistoj kaj direktoroj estas pli liberpensemaj, ofte ili strebas havi ion nekutiman por emfazi la elitecon de sia lernejo, kaj Esperanton oni povas akcepti ne malpli > p.11



**P**ri la lingvo komprenebla kaj parolebla per ĉiuj oni revas dum multa tempo. Verŝajne de tiam, kiam aperis la problemo de diverslingveco. La maloportuneco de tiu fakto ŝajnis vera kondamno de la homaro. Kion reflektis ekzemple la Biblia historio pri la Babilona turo. Sed plej krude la problemo estas sentita dum la nova tempo kiam malaperas la limoj inter la landoj: kulturoj kaj popoloj.

Aspektas iom strange la situacio inter kelkaj samstile vestitaj homoj, kiuj apartenas al la sama kulturo (ekz. la eŭropa) sed interkomprenas helpe de la tradukistoj. En la historio oftis kaj oftas okazoj kiam la rolon de internacia lingvo ludis iu el plej disvastigitaj aŭ dominantaj (ekonomie, kulture, religie). Tia estis la latina dum la eŭropa mezepoko, la araba en la Proksima Oriento ktp. Nun por tiu rolo pretendas la angla.

Tamen la disvastigo de la angla lingvo ofte elvokas proteston kaj reziston flanke de difinita parto de la homaro. Krom tio, la angla estas tre malfacila, ĉefe por la ne eŭropidaj popoloj. Plej verŝajne la nuna supereco de la angla estas difinita per ekonomia situacio en la mondo, sed ne povas daŭri senfine.

Ĝuste la supre menciitaj kaŭzoj iniciigis multajn homojn krei artefaritajn lingvojn. Plej sukcesa de la centoj kaj miloj projektoj estis Esperanto. Tamen rigardante la disvastiĝon de Esperanto ni povas vidi la blankajn makulojn en la Proksima Oriento. Ni povus konkludi ke tie fortajn poziciojn havas Islamo kaj por tio oni uzas la araban kiel internacia.

Sed reale la araba ne estas uzata en la ĉiutaga vivo en la landoj kun islama loĝantaro. Ĝi restas religia lingvo. Estas tre kurioza la fakto ke Esperanto estas relative disvastigita en Pakistano kaj Irano - la landoj kies loĝantaro plej parte uzas hindeŭropajn lingvojn (la persan, urdu ktp). Verŝajne Esperanto mense pli taŭgas al tiuj.

Do, ni lasu ĉimomente Esperanton aŭ alian

### Legindaj Esperanto-Blogoj

**Ĉ**u vi volas legi artikolojn en Esperanto? Ĉu vi serĉas blogojn kaj legindaĵojn? Jen manlibro por gvidi vin al la plej bonaj kaj plej gravaj blogoj, almenaŭ laŭ mi. Kompreneble mi havas nek tempon nek spacon por preparoli ĉiujn blogojn, do mi pardonpetas se mi maltrafis iun. Mi elektis la blogojn kiuj estas aktiva, interesa (por mi kaj/aŭ por vi) kaj esperantlingva.

artefaritan lingvon. Ni provu prognozi solvon de la interkomprena problemo. Rerigardante ni vidas ke parte la problemo estis solvita komence per dulingvismo.

Estas interesa ideo disvastigi la turkan lingvon kiel internacian por ĉiuj popoloj de Centra Meza kaj malgranda Azio – de Jakutio kaj Orienta Turkistano (Okcidenta Ĉinio) ĝis Turkio. Kaj fakte ni jam vidas la tendecon. Ĝi estas difinita per kelkaj kialoj:



1. La turkidaj lingvoj estas tre stabilaj. La tempo kaj distanco ne tro tuŝis ilin. La jakuta lingvo estas pli proksima al la turka ol la rusa al la germana. La samon ni povus diri rilate al la diferenco inter la praturka kaj la moderna turka - diferenco estas minimuma (kompare kun hindeŭropaj, eĉ la malnovrusa pli diferencas rilate al la moderna). Fakte diferencoj de la turkidaj lingvoj aperis dum Rusio dividis turkajn popolojn kaj entrudis la rusan kiel internacia.

2. Turkio estas plej evoluinta lando inter la 'turklingvaj landoj' iam kaj nuntempe supremaj per Rusio aŭ Sovetio. Fakte la turka iam jam estis internacia lingvo en Kaŭkazo kaj Meza Azio. Kaj post la disfalo de la Rusia Imperio, Sovetio kaj eventuale nuna Rusio aperas nova ŝanco.

3. La turka uzas la latinan alfabeton. Ĝiaj avantaĝoj ne postulas iujn pruvojn

4. La baza turka vortaro estas komprenebla por pleja parto de la turkidaj popoloj.

5. La turkan posedas pli ol 80 milionoj da homoj en Turkio kaj kelkaj milionoj en Irano.

verkis **Andrey Bochkarev**, el Rusio/Turkujo

Fonto: <http://www.atakum.ru/?p=96>

### el la blogo TeoKajLibro

Nomo: **Libera Folio**

Retejo: <http://www.liberafolio.org/>

Temo: **La Esperanto-movado**



Sendube la plej altkvalita kaj grava blogo en Esperanto estas Libera Folio. Fakte la kvalito estas tiel alta ke mi dubas ĉu oni povas nomi ĝin "blogo" ĉar ĝi estas kiel interreta gazeto. Alikaze ĝi estas la plej bona maniero por informi pri la Esperanto-movado kaj la aktiveco de Esperantistoj. Ĝi ofte kritikis UEA kaj TEJO, kiu laŭ mi estas tre grava rolo ĉar ĝi kontrolas kaj certigas ĉu la organizoj bone funkcias. Kritiko vigligas la movadon, korektas erarojn kaj instigas pliboniĝon. Sed ĝi ne nur kritikis, ĝi ankaŭ laŭdas kaj varbas pri novaj projektoj. Se iu grava okazas en Esperantujo, Libera Folio kutime estas la unua informilo kaj la plej bona klarigilo.

Nomo: **Scivolemo**

Retejo: <https://scivolemo.wordpress.com/>

Temo: **Scienco**



Ĉu vi volas legi pri steloj, planedoj, nanoteĥnologio, faŭno kaj la galaksio? Se jes, legu la blogon de Frank van Hertooij! Ĉiusemajne li skribas pri la fascina kaj mirinda mondo de scienco. Mi taksas ĝin unu el la plej interesaj blogoj en Esperantujo kaj amas legi ĝin. Ĝi kontribuas multege al mia scio pri scienco kaj mi ĉiam lernas novajn interesajn aferojn. Se vi estas scivolema, scivolemumu!

Nomo: **Stela ĉiam nur kritikis**

Retejo: <https://stelachiamnurkritikas.wordpress.com/>  
Temo: **Esperanto-renkontiĝoj**



Se vi volas vidi malantaŭ la kurteno de Esperantujo kaj kio okazas en la organizo de renkontiĝoj, legu la blogon de Stela. Ĉar ŝi estas denaksulo, ŝi partoprenis renkontiĝojn dum ŝia tuta vivo kaj ofte organizas renkontiĝojn en Hungario. Pro tio, ŝi havas grandegan sperton pri kiel eventoj okazas kaj okazu. Kiel la titolo diras, ŝi ofte estas kritikema pri renkontiĝoj kaj ne hezitas plendi pri fuŝoj. Sed

malgraŭ la titolo, ŝi ankaŭ donas tre utilan konsilon kaj la blogo estas tre utila ilo por lerni kiel plibonigi renkontiĝon.

Nomo: **Le Monde Diplomatique en Esperanto**

Retejo: <http://eo.mondediplo.com/>

Temo: **Politiko kaj Socio**



Ĉi tiu blogo malsamas al la aliaj ĉar ĝi konsistas el tradukitaj artikoloj el la fama franca gazeto Le Monde Diplomatique. Ĝi estas la plej serioza kaj solena blogo en Esperanto, kiu ne estas laŭ ĉies plaĉo. La artikoloj iam estas tro densa kaj detala, sed ĝenerale ili estas pripensigaj kaj klarigas novajn aferojn al mi. Ili kutime temas pri politiko kaj mondaferoj, ofte pri landoj pri kiuj mi konas malmulte. La retejo ne estas la plej belaspekta do oni devas labori iomete por legi la artikolojn, sed ili ĝenerale estas laborinda.

Nomo: **Egalecen**

Retejo: <https://egalecen.org/>

Temo: **Feminismo kaj GLATismo**



Ĉi tiu blogo estas miksaĵo kaj ne laŭ ĉies plaĉo. Ĝi uzas ri kaj -iĉ, do tiu informas vin pri la politikaj opinioj de la verkistoj. Iuj artikoloj estas tre interesaj kaj bonverkitaj, sed aliaj estas bagatelaj kaj troigitaj. La blogo diskutas kiel feminismon kaj GLAT-ulajn rilatas al moderna socio kaj tradukas usonajn konceptojn al Esperanto (kiu povas esti avantaĝo aŭ malavantaĝo laŭ via opinio). Kiam ĝi estas bona, la artikoloj estas tre diskutindaj kaj pripensindaj.

Nomo: **Aktualaĵoj de Sciencia Revuo**

Retejo: <https://teamoisae.wixsite.com/isaekajaktuale.sciencia-revuo.info/>

Temo: **Scienco**

Ĉu vi konas la Internacia Sciencia Asocio Esperantista



kaj ties gazeto Scienca Revuo? Se ne, legu sian blogon, kiu disdonas la artikolojn antaŭ la apero en la scienca revuo. Ĝi ankaŭ tradukas artikolojn kaj ĝenerale diskutas la mondon de scienco. Antaŭ monatoj, ĝi translokiĝis al nova retejo, sed mi ligis al la malnova retejo ĉar ankoraŭ estas multaj interesaj artikoloj tie.

Nomo: **Esperanta Retradio**

Retejo: <http://esperantaretradio.blogspot.ie/>

Temo: **Socio**



Se estus premio pro laborememco, ĉi tiu blogo certe gajnus. Ĝi aperigas originalajn artikolojn ĉiutage dum jaroj! Kiel la nomo diras, ĉiu artikolo ankaŭ estas aŭskultebla kaj legebla, kiu certe helpas komencantojn komfortiĝi kun la sono de nia lingvo. Ne facilas priskribi la temojn de la artikoloj ĉar povas temi pri iu ajn en la mondo. La artikoloj diskutas socion, kulturon, historion, filmojn, politikon ktp preskaŭ ĉiu krom Esperanto mem.

Nomo: **Neniam Milito Inter Ni**

Retejo: <http://neniammilitointerni.over-blog.com/>

Temo: **Politiko**



Ĉi tiu ankaŭ estas aktivega blogo kun unu aŭ du novaj artikoloj po tago. La artikoloj ĝenerale estas tradukitaj el la franca kaj temas pri politikaj aferoj kaj novaĵoj. La novaĵoj venas al ĉie do oni ja lernas multe pri mondaj

aferoj. Bedaŭrinde, la retejo estas tre malbela kaj dolorigas miajn okulojn. Mi ankaŭ ne ŝatas ke ŝprucfenestro aperas kiam oni eniras la retejon.

Nomo: **Esperanto.Blog**

Retejo: <https://esperanto.blog/>

Temo: **Novaĵo**



Se vi preferus legi iun pli simplan kaj mallongan, jen la blogo por vi. Ĉiutage aperas novan artikolon pri novaĵa afero aŭ okazaĵo tradukita el nacia gazeto. Ili ĝenerale estas amuzaj, nekutimaj okazaĵoj kaj ne tro serioza. Persone mi opinias ke ĝi estas maltro detala kaj tro bagatela, sed laŭ ĉies plaĉo.

Nomo: **El Popola Ĉinio**

Retejo: <http://www.espero.com.cn/>

Temo: **Novaĵo**



Ĉi tiu blogo aŭ novaĵ-retejo donas novaĵojn el Ĉinio. La artikoloj temas pri okazaĵoj, eventoj kaj interesaj aferoj el Ĉinio kiun oni ne vidas en aliaj gazetoj. Ĝi donas interesan kaj novan vidpunkton pri la lando. Ĉar la retejo apartenas al la ŝtato, iuj artikoloj estas propagandaj kaj troigas la laŭdojn por la landestraro kaj komunista partio (kompreneble ĝi neniam kritikas). Sed tiu ankaŭ estas interesa.

Nomo: **La Balta Ondo**

Retejo: <http://sezonoj.ru/>

Temo: **Esperanto**



La Balta Ondo estas gazeto sed multaj artikoloj aperas interrete do tial mi aldonis ĝin al mia listo. Plejparte la artikoloj temas pri Esperanto, do oni povas legi pri la movado, famajn Esperantistojn, lingvistikajn diskutojn pri la lingvo mem, recenzojn de libroj, prelegoj, renkontiĝoj ktp. Ankaŭ aperas artikoloj

kiuj tute ne rilatas al Esperanto, sed al historio, scienco, kulturo ktp.

Fonto: <https://teokajlibroj.wordpress.com/2018/01/16/legindaj-esperanto-blogoj/>

## Iom granda aĉeto

**W**olfgang Hildesheimer (1916-1991) fuĝis kun siaj gepatroj el Germanio kaj lernis en Palestino la metion de lignaĵisto. Kun la brita armeo li revenis al Germanio. Li interpretis dum la proceso pri la militkrimoj en Nürnberg. Poste li vivis kiel pentristo kaj verkisto, en Germanio kaj Svislando.

Hildesheimer verkis prozon kaj dramojn. Ofte li reuzis unu temon en pluraj kuntekstoj. Li famiĝis unue pro "absurdaj teatraĵoj" en la maniero de Beckett kaj Ionesco. Per satiro kaj groteska fantazio li senmaskigas lingvajn kliŝojn, ekzemple en Senamaj Legendoj, kie aperis la ĉi tie prezentita teksto. Li ironias pri la enhavo de klasika edukado, ekzemple per realismaj biografioj de fikciaj personoj.

En 1984 li anoncis sian adiaŭon de literatura verkado, ĉar ne plu eblis elpensi novajn konstelaciojn. Anstataŭe li pentris "foje konkrete, foje senkonkrete kaj foje tiel senkonkrete, ke nenio videblas, kio elvekas en mi senton de profunda kontenteco" (citaĵo el: Komunikoj al Maks pri la stato de la aferoj).

## IOM GRANDA AĈETO

Lun vesperon mi sidis en la vilaĝa drinkejo antaŭ (pli precize, malantaŭ) glaso da biero, kiam viro kun normala aspekto sidiĝis apud min kaj demandis min per dampite konfidenca voĉo: ĉu mi deziras aĉeti lokomotivon. Estas ja facile vendi al mi ĉion ajn, ĉar por mi estas malfacile diri "ne", sed por tiel granda aĉeto evidente necesis iom da prudento. Spite al mia malampleksa scio pri lokomotivoj, mi demandis pri la tipo, konstruaro kaj piŝtovasteco por doni al la viro la impreson, ke li intertraktas kun spertulo, kiu ne pretas aĉeti "la katon en la sako". Mi ne scias, ĉu mi sukcesis transdoni al li tiun impreson, tamen li donis libervole ĉiujn informojn, montris al mi vidojn de la objekto de antaŭe, malantaŭe kaj de la flankoj. Ĝi aspektis bone, tiu lokomotivo, kaj mi mendis ĝin, kiam ni interkonsentis pri la prezo. Ĝi ja estis uzita kaj spite al tio, ke lokomotivoj eluziĝas tre malrapide, mi ne pretis pagi la plenan katalogprezon.

Jam en la sama nokto oni alportis ĝin. Eble tiu tuja liverado, devintus komprenigi min, ke io en la transakcio estis nehonesta, sed pro mia nesuspекtemo, tio ne venis en mian kapon.

## tradukis Wolfgang Kirschstein, el Germanujo

Kompreneble mi ne povis havi ĝin en la domo -- la pordoj ne permesus tion, kaj cetere la domo verŝajne estus frakasinta pro ĝia pezo -- tial ĝi devis esti en la garaĝo, ajnakaze la plej oportuna ejo por transportiloj. Kompreneble la longo konformis nur duone, kompanse la alto sufiĉis, ĉar en tiu garaĝo mi iam lokigis mian aerostaton, sed tiu eksplodis.

Nelonge post la aĉeto mia kuzo vizitis min. Li estas homo, kiu malŝatas ĉiujn spekulaciojn kaj sentesprimojn, kaj kiu akceptas nur nudajn faktojn. Nenio surprizas lin, ĉion li jam scias antaŭ ol vi rakontas, eĉ pli ekzakte, ĉion li kapablas klarigi. Mallonge: netolerebla viro. Ni salutis unu la alian kaj por plenigi la sekvintan embarasan paŭzon mi komencis:

-- Tiuj delikataj aŭtunaj odoroj...

-- Velkanta terpomherbo, -- li reis kaj esence li ja pravis.

Momente mi rezignis, verŝis iom da konjako, kiun li alportis. Ĝi gustis je sapo kaj mi esprimis tiun impreson. Li respondis, ke tiu konjako, kiel videblas sur la etikedo, estis gajninta konsiderindajn premiojn dum la mondekspozicio en Lieĝo kaj Barcelono, en Sankta Luizo eĉ la oran medalon, sekve ĝi estis bona.

Kiam ni estis trinkintaj pli da konjako, li decidis tranokti ĉe mi kaj li eliris por parki sian veturilon. Post kelkaj minutoj li revenis kaj diris per mallaŭta, iom tremanta voĉo, ke en mia garaĝo troviĝis granda rapidtrajna lokomotivo. "Mi scias", -- mi diris trankvile kaj gustumetis konjakon. -- "Mi aĉetis ĝin antaŭ nelonge". Responde al la demando, ĉu mi ofte uzas ĝin, mi respondis negative: ne ofte, nur antaŭ nelonge mi veturigis najbaran kamparaninon, kiu atendis feliĉan patriniĝon. Jam en la sama nokto ŝi enmondigis dunaskitojn, sed tio apenaŭ rilatis al la nokta lokomotivveturado. Cetere, ĉio estis elpensita, sed dum tiaj okazoj mi ne povas rezisti al la tento ornami la realon. Mi ne scias, ĉu li kredis min, silente li registris ĉion kaj evidente li ne plu fartis bone. Li fariĝis malbabilema, trinkis plian glaseton da konjako kaj adiaŭis.

Mi neniam plu revidis lin.

Kiam post nelonge ĵurnaloj informis, ke la francaj > p.22



**E**n novembro mi publikigis enketon pri Esperanto en Interreto. Por kolekti diversan gamon de opinioj, mi afiŝis mian enketon en Reddit, Fejsbuko kaj Tvitero. Ankaŭ mi retroŝtis ĝin al miaj konatoj el la tuta mondo kaj petis, ke oni diskonigu ĝin. 86 homoj respondis al la enketo. Kompreneble, la enketo ne spegulas la opiniojn de ĉiuj esperantistoj, tamen ĝi donas utilan superrigardon pri la ĝenerala interrete konektita esperantistaro.

kiam mi trafis artikolon pri internaciaj lingvoj. Baldaŭ poste mi trovis la unuan mencion pri Esperanto.

Kiel Esperanto-jutubiston, ankaŭ ne surprizas min la granda efiko de jutubo. Famaj prilingvaj jutubistoj kaj blogistoj kiel Benny Lewis, Steve Kaufmann kaj Lindsay Williams bone prezentis Esperanton al sia spektantaro.



**Chuck Smith:** Estas iom nekredible por mi, ke

mia laboro pri Vikipedio en 2001 estis tiom fruktodona! Mi bedaŭras, ke multaj el la tradicia movado ne ĝuste komprenas la gravecon de Vikipedio, JuTubo kaj Reddit kaj ties influon al la junularo.

Fakte, plej efike tiurilate estis ĝuste la agado de Judith Meyer pri la filmeto Esperanto: Like a Native (la titolo estas angla vortludo, kiu povas esti tradukita kiel "Kiel denaskulo" aŭ "Ŝatu denaskulon") en kiu ŝi intervjuis ses denaskajn esperantistojn. Ŝi rimarkis, ke neesperantistoj plej interesiĝas pri denaskaj esperantistoj, do decidis krei filmeton pri tio. Poste ŝi planis sesion en


Reddit kie ĉiuj povus demandi ion ajn al la denaskuloj. Tio surprize eĉ atingis la ĉefpaĝon de tiu famega retejo kaj nekredible multe da homoj spektis la filmeton. Fakte, laŭ statistiko tiu filmeto estis spektita pli ol 325.000-foje! Indas pripensi similajn iniciatojn por diskonigi la lingvon.

**Robert Nielsen:** Ankaŭ por mi, Vikipedio estas komprenebla elekto. Kiam mi volas lerni pri ia nova afero, mi kontrolas tie. Jutubo montras la gravecon de novaj medioj per kiuj junuloj informiĝas pri la mondo. Por mi la plej granda surprizo estas la graveco de Reddit, ĉar multaj esperantistoj ne konas ĉi tiun retejon.

**Se vi unue lernis Esperanton per Interreto, kiujn lernilojn vi precipe uzis por lerni la lingvon?**

**Richard (Evildea):** Antaŭ du jaroj, kiam Duolingo debutis kun Esperanto-kurso, kelkaj eminentuloj publike esprimis sian dubon pri la efikeco de retaj instruiloj. Nun du jarojn poste la aktualaj rezultoj montras, ke retaj instruiloj ne nur efikas, sed ankaŭ kreas tute novan generacion de

Duolingo	44.50%
Lernu.net	26.40%
Eksterinterete	6.40%
Vikipedio	6.40%
Memrise	4.50%
Retejo	2.70%
Jutubo	2.70%
Bitibro	1.80%
Anki	0.90%
Bab.la	0.90%
Fejsbuko	0.90%
Kurso.br	0.90%
Retpoŝta kurso	0.90%



Komence mi intencis verki mallongan artikolon surbaze de ties rezultoj tamen evidentiĝis, ke pli profunda analizo necesis. Mi decidis disponigi al ĉiuj la datumojn kaj petis la opiniojn de aliaj fakuloj pri Esperanto en Interreto. Jen niaj kontribuantoj:

**Richard Delamore**, kiu uzas la kaŝnomon Evildea, estas fama Esperanto-Jutubisto kaj kunfondinto de Amikumu.

**Chuck Smith** estas fondinto de la Esperanta Vikipedio, kunorganizanto de la Polyglot Gathering, kontribuanto de la kurso de Esperanto ĉe Duolingo, kaj kunfondinto de Amikumu.

**Robert Nielsen** estas Esperanto-blogisto, eksvolontulo kaj retumanto.

**Robin van der Vliet** estas kunordiganto de la grandega komunumo en Telegramo.

Vikipedio	21.70%
Jutubo	19.60%
Reddit	15.20%
Amiko	10.90%
Artikolo	8.70%
Forumo	6.50%
Lernu.net	4.30%
Podkasto	2.20%
Libro	2.20%
Videoludo	2.20%

**Se vi unue konatiĝis kun Esperanto per Interreto, kie vi unue aŭdis pri ĝi?**

**Richard (Evildea):** Ne surprizas min, ke Vikipedio estas tiel elstare reprezentita. Sep jarojn antaŭe mi mem hazarde malkovris Esperanton per Vikipedio. Mi memoras, ke mi estis leganta artikolojn kaj sekvis ligilojn,

aktivuloj. La tradiciaj metodoj de instruado nun palas kompare al la granda ondo da freŝbakitoj naskiĝintaj per lernu.net (mia bakejo) kaj poste Duolingo.

**Chuck Smith:** Mi jam iom miras, ke ĝuste pli ol duono el la lernantoj lernas Esperanton per Duolingo kaj Vikipedio! Tio estas tute alia sperto ol la 10-leciona retpoŝta koresponda servo per kiu mi lernis en 2001. Se mi komencus lerni Esperanton hodiaŭ, mi verŝajne mem komencus per Duolingo kaj Lernu, do ne surprizas min, ke homoj tiel lernas.

**Robert Nielsen:** Kompreneble, Duolingo kaj Lernu estas la plej popularaj metodoj, la nura surprizo estas ke iuj ne uzas tiujn retejojn. Ĉu estas bone, ke lernado estas koncentrita en nur du lokoj? Verŝajne tio ne malhelpas, ĉar simpligas la disdonon de konsiloj, oni povas facile klarigi, kie kaj kiel oni povas lerni la lingvon.

**Robin van der Vliet:** Mi mem aŭdis pri Esperanto per Duolingo kaj la apero de la Esperanta kurso instigis min eklerni Esperanton. Estas mirinde vidi, ke plejparto da homoj precipe lernis sammaniere kiel mi.

Fejsbuko	23.80%
Telegramo	16.80%
Reddit	10.80%
Amikumu	7.60%
Retpoŝto	5.90%
Twitter	5.90%
Skajpo	5.40%
Discord	4.90%
Whatsapp	3.80%
Lernu.net	3.20%
VK	2.70%
Retejo	1.60%
IRC	1.60%
Edukado.net	1.10%
Duolingo	1.10%
Jutubo	1.10%
Google Plus	0.50%
Instagram	0.50%
Libera Folio	0.50%
Vikipedio	0.50%

### Kiujn komunikilojn aŭ retejojn vi uzas por babili kun aliaj esperantistoj en Interreto?

**Richard (Evildea):** Plej interesas min, ke oni tiom multe uzas Amikumu por komunikado. Komence ni celis provizi uzantojn per baza komunikilo por rapide efektiviĝi kunvenojn. Ni ne celis krei kompleksan komunikan sistemon. Tamen lastatempe evidentiĝas, ke oni emas uzi la tujmesaĝilon por pli vastaj celoj.

Mi ofte frekventas la retejon Reddit kaj respondas al afiŝoj tie. Tamen mi ne konscias, ke aliaj tiom multe ŝatas ĝin. Surbaze de ĉi tiu rezulto, mi opinias ke movadaj aktivuloj devas pli atenti la utilecon de ĉi tiu retejo. Ĝi havas la unikan povon disvastigi novaĵon rapide kaj viruse inter esperantistoj el la tuta mondo.

**Chuck Smith:** Mi surpriziĝas, ke tiom da esperantistoj uzas Amikumu kiel komunikilon. Telegramo iusence iĝis la ĉefa maniero komuniĝi inter junaj esperantistoj, do tio tute ne surprizas min. Robin bonege kreis la infrastrukturon, per kiu la esperantistaro povus organizi sin. Oni ofte parolas pri faka agado, sed laŭ mi Telegramo estas la plej grava faka agado en la 2010-aj jaroj, ĉar homoj de diversaj fakoj povis finfine havi taŭgan lokon por diskuti ĉion

rilate al sia temo.

**Robert Nielsen:** Mi konsentas, ke fejsbuko estas la plej granda interreta Esperantujo, kaj estas interese, ke Telegramo ankaŭ gravas. Ĝi certe estas la plej facila ilo por komunikado kun homoj. Estas bone, ke Amikumu jam estas populara kaj uzata por komuniki, kiam ĝi ankoraŭ estas juna kaj nova. Denove la surprizo estas Reddit, ĉar oni ne ofte rekte parolas kun aliaj homoj. Ĉar mi estas estrarano de la reditero, mi ĝojas.

**Robin van der Vliet:** Mi ĝojas pri la granda procentaĵo por Telegramo, kaj mi esperas, ke ĝi daŭre tiel kreskos estontece, mi ankoraŭ havas kelkajn planojn por ĝi.

### Se vi aktive agadas en la eksterreta Esperantomovado, kiel vi utiligas Interreton por viaj lokaj agadoj?

**Richard (Evildea):** Plej surprizas min, ke retejoj de asocioj ankoraŭ grave rolas. Mi honeste neniam vizitas la retejojn de la lokaj asocioj. Mi povas trovi ĉion necesan per fejsbuko, Meetup aŭ Amikumu. Malgraŭ tio la enketo indikas, ke lokaj retejoj ankoraŭ gravas. Mi do konsilas, ke oni daŭrigu ĝisdatigi ilin.

**Chuck Smith:** Mi miras, ke tiom da esperantistoj uzas Meetup.com! Mi iel havis la impreson, ke ĉio nuntempe okazas per Fejsbuko kaj retejoj de asocioj kiel <https://esperanto.berlin>, en kiu ni listigas la eventojn de la sep Esperantaj grupoj en Berlino. Mi ankaŭ kompreneble ĝojas, ke oni uzas Amikumu ne nur por komuniki rete, sed ankaŭ por subteni eksterretan agadon kiel ni ja intencis de la komenco!

**Robert Nielsen:** La diverseco de metodoj estas interesa. Meetup kaj Fejsbuko estas klaraj kaj kompreneblaj. La novaj metodoj de Amikumu kaj Duolingo kreskas, sed la tradiciaj retpoŝtoj kaj asociaj retejoj ankoraŭ fortas.

**Robin van der Vliet:** Mi ne sciis, ke Meetup.com estas tiom populara retejo inter esperantistoj, mi neniam vere aŭdis pri ĝi antaŭe. Kiel estrarano de la Nederlanda Esperanto-Junularo, ni ĉefe uzas retpoŝton, Telegramon kaj Fejsbukon por informi niajn membrojn.

**Richard Delamore**  
(daŭrigota)

Fonto: **La Balta Ondo**  
<http://sezonoj.ru/2018/02/interreto>

Meetup.com	19.50%
Fejsbuko	16.70%
Retejo de Asocio	16.70%
Retpoŝto	13.90%
Amikumu	11.10%
Google Plus	5.60%
Duolingo Events	5.60%
VK	2.80%
Telegramo	2.80%
Yahoo Groups	2.80%
Whatsapp	2.80%

**S**aluton amikoj, La mondo pri veganaj burgheroj estas senlima! Nur sufiĉas iom trarigardi vian manĝoŝrankon kaj tuj elpensi burgheron! Ni diru ke pli malpli tiel naskiĝis ĉi burghero. Nur 100 gramoj da kikeroj kuiritaj sen salo donas al ni karbonhidraton (kiu donas energion), dieta fibro (bona por la kora kaj digesta sano), proteinoj kaj grasoj, sed krome, ili donas al ni vitaminojn A, B6, C, E kaj K, kalcio, fosforo, kalio, zinko, magnezio, fero kaj natrio. Kaj la aveno estas alia bonega nutraĵo ĉar ĝi satigas, preventas kaj mildigas la mallakson, bona por homoj kun alta kolesterolo, preventadas la kanceron, favorigas la kreadon de nova histo kaj nia koro pli bone fartos!

Post tiuj sciencaj argumentoj por manĝi tiaspecan burgheron, kiu ja estas sana rapidmanĝaĵo, jen la recepto. Mi esperas ke vi ĝin ĝuos!

**Ingrediencoj:**

- 400 gr da kuiritaj kikeroj
- 100 gr da avenflokoj
- 1/3 taso da faruno
- 4 ajleroj tre fajne tranĉitaj aŭ kulereto da seka ajlo
- 1 kulereto da kareo (pulvorigita)
- 1 kulereto da kumino
- 1/2 kulereto da nigra pipro
- 1 kulereto da salo
- 1/2 kulereto da natria bikarbonato
- Olivoleo
- Suko el unu citrono

Por la akompano: terpomoj, avokado, ruĝa cepo,



eruko aŭ kio ajn plaĉu al vi!

**Paŝoj:**

Premu la kikerojn per premilo en ujo ampleksa. Aldonu ĉiujn aliajn ingrediencojn kaj miksu bone farante samecan paston. Dividu la paston farante bulojn, platigu ilin per via mano mem. Poste sur pato varma kaj kun iomete da oleo kuiru la burgherojn tri minutojn por ĉiu flanko

Fonto: <http://veganarto.net/burghero-el-kikeroj-aveno-kaj-kareo-2/>



**Malferma Tago (28-a de aprilo 2018)**



Vizitu la **Centran Oficejon de UEA** (Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo, Nederlando) okaze de la **Malferma Tago sabaton la 28-an de aprilo 2018 (10h00–17h00)**.

Renkontu kaj aŭskultu niajn specialajn gastojn, la redaktorojn de la revuo Esperanto, Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova, kaj la ĉefredaktoron de la Esperanto-eldono de la Unesko-Kuriero Trezoro Huang Yinbao.

La sekvan tagon, la 29-an de aprilo 2018, okazos por la kvina fojo Seminario pri Informado.

1	K	R	I	T	R	O	K	O	N	D	K	E
2	O											
3	L	A	B	A	R	O			T	O	R	I
4												
5	A	D		E	A	J	K	L	O	N	I	
6	S	A	L	A			R	E	G	A		
7	O		A									
8			A	L	A	N	O		F	A	R	O
9												
10												
11												
12												



Solvo de la krucvort-enigma